Estonio 100-jara

Ekonomia, politika kaj socia situacio en 2018

Originale verkita en Esperanto de Andreas Künzli (Svislando)

La 24an de februaro 2018 Estonio festis sian 100an naskiĝjaron.[1] Okaze de tiu festotago en Tallinn okazis armea parado, kiu pro la partopreno de taĉmentoj el Finnlando, Francio, Kartvelio, Italio, Latvio, Litovio, Pollando, Svedio, Danlando, Britio, Ukrainio kaj Usono estis ĉijare pli granda ol kutime.[2] La kulminon de la festo formis la akcepto de honoraj gastoj fare de la prezidentino de Estonio, s-ino Kersti Kaljulaid, kiu diris en sia alparolado jenon:

„Ni ĝoju, ke ni fartas bone. Inter la 192 ŝtatoj de la mondo nur unu kvinono estas pli riĉa ol ni. Malgranda ŝtato bezonas grandajn ideojn kaj grandajn celojn. Sed ni ne povas permesi al ni simple lasi nin movi de la historio. Ambicia malkontenteco kaj la kredo, ke la morgaŭa tago estos pli bona ol la hodiaŭa, se ni streĉe laboras, tio estis siatempe kaj estas nuntempe la ŝlosilo, kiu malfermas la pordojn al pli bona estonto, kaj kiu helpas al ni kompreni nian rapidan progreson dum la lastaj 25 jaroj, kiam ni denove povis mem decidi en la propra lando. (…)“ La ŝtatestro aludis en sia memorinda parolado plurajn temojn kaj problemojn, kiuj aparte gravas por la estona publiko: la kreskantna ŝovinismon, perforton en la familio, edukadon kaj klerigon, lingvon kaj kulturon, sed ankaŭ la protektadon de la naturo, praktikadon de la amaskomunikiloj kaj utiligon de la publikaj monrimedoj.[3]

Krom la sperto de la okupacio kaj fremda regado, kiu signifis grandan defion por Estonio, la estonoj havas malmultan sperton kun la historio, el kiu necesas lerni la taŭgajn lecionojn kaj eltiri la ĝustajn konkludojn.

Ĉar la sukceson aŭ malsukceson, progreson aŭ malprogreson de iu (ekonomia) evoluo oni plej taŭge mezuras per ciferoj, en ĉi tiu raporto oni do renkontos neeviteble amason de ciferoj.

EKONOMIO

Ĝeneralaj trajtoj

Tuj post la reakiro de la ŝtata sendependeco en 1991 Estonio radikale transformis sian ekonomon de la sovetia planekonomio al liberalisma okcidenta merkatekonomio. Liberalisma ekonomia sistemo signifas, ke en Estonio oni povas facile kaj sen granda burokratio fondi entreprenon kaj ke la impostoj estas malkomplikaj kaj favorkondiĉaj. Ŝtataj monopoloj ne ekzistas, escepte de la fervojo kaj energia distribuado. Por sendependiĝi de la rubla zono, en 1992 Estonio enkondukis la estonan kronon, kiu estis ligita al la germana marko. En 2011 Estonio transprenis la eŭromonon, kiel unua balta lando. La malfermiĝo de la malgranda estona merkato kaj la enkonduko de la okcidenta valuta politiko kaŭzis rapidan kreskon de eksterlandaj investoj, antaŭ ĉio el Finnlando kaj Svedio. Samtempe rapide

[1] Vd. https://www.ev100.ee.
[2] Vd. https://www.youtube.com/watch?v=Nh9f8j7gDHc.
[3] Vd. https://www.president.ee/en/official-duties/speeches/14154-the-president-of-the-republic-at-the-estonian-national-museum/index.html.

disvolviĝis la eksportoj. Tio estis la ĉefa kontribuo por atinigi merkatan stabilecon kaj estis la kondiĉoj por rapida integrado de la estona ekonomio en la okcidenteŭropan merkatsistemon. En tiu ĉi historia momento Estonio anstataŭis la antaŭan komercan ĉefpartneron Ruslando. Hodiaŭ, la produktoj kaj varoj en Estonio havas grandparte okcidentan nivelon. Resume: Estonio disponas pri moderna kaj liberalisma merkatekonomio kun interesaj investopcioj, kiuj altigis la allogon de tiu lando por ekonomaj akivecoj. Malgraŭ ĉiuj avantaĝoj, tiuj aktivecoj restas limigitaj grandparte al regiona signifo.

Estonio plene koncentriĝas pri prospera ekonomio. La raporto „Fari komercon en 2018“, kiu estis verkita de la Monda Banko, donis al la Baltaj Ŝtatoj pozitivan pritakson. En la komparo kun 190 ŝtatoj Estonio okupas la 12an rangon, antaŭ Litovio (16) kaj Latvio (19). Tiu alta pozicio estas dankata precipe al la favora impostsistemo de Estonio kaj al la facileco fondi novan entreprenon aŭ ricevi konstru-permeson, elektran konekton aŭ bankan krediton. Financministro Toomas Tõniste interpretis la bonan rangon per la agnosko de la „bona laboro de niaj doganaj kaj impostaj aŭtoritatoj“ fare de la Monda Banko. Najbara Finnlando ricevis rangon 13. Nature, ankaŭ la estona ekonomio dependas de la „kapricoj“ de la evoluo de la eŭropa kaj monda ekonomio. Post jaroj de alta kunjunkturo (2005-7) komenciĝis falo, kiu kulminiĝis en la financa krizo de la jaro 2009. La ekonomio malkreskis je 14 procentoj. Sed jam en 2010 ĝi rekreskis je 2,3 procentoj. En 2011 oni registris kreskon de la malneta enlanda produkto de 7 procentoj, en 2012 de pli ol 3%, kio signifis, ke la estona ekonomio restabiliĝis. En 2015 pasis pli malforta fazo kun kresko de 1,1%. Laŭ provizora prognozo, la ekonomio de Estonio forte kreskos ankaŭ en la venontaj jaroj, se la mondan evoluon ne ĝenos nova drasta krizo.

Tiu kresko esence influas ankaŭ la labormerkaton: En 2015 la senlaboreco en Estonio estis 6,6 procentoj, post 16,8% en 2010, 12,5% en 2011, 10,2% en 2012, 8,6% en 2013 kaj 7,4% en 2014. En Estonio mankas multaj fakuloj, inter alie pro la ofta forveturo de estonaj laborfortoj al eksterlando, por gajni pli altajn salajrojn.

Laŭ regionoj, plej draste je la senlaboreco suferas la nordoriento kaj sudo Estonio: En nordoriento pro la ĉesigo de la industrioj kaj en la sudo pro la problemoj de la agrikulturo. Sed la kamparanoj en la sudo disponas pri propraj privataj entreprenoj, kiuj vivtenas ilin, dum en la nordoriento, kie la heredaĵo de la sovetia tempo estas plej forte sentebla, ekzistas nur senposedaj malriĉaj laboristoj.

Ankaŭ la inflacio, kiu en 2011 estis ankoraŭ 5 procentoj, malpliiĝis de jaro al jaro al 2,8% en 2013. En 2014 kaj 2015 ĝi estis eĉ negativa (-0,1% kaj -0,5%). La novaj ŝuldoj sumiŝas je 0,3 procentoj de la malneta enlanda produkto, kio signifas, ke Estonio plenumas la kriteriojn de la Traktato de Maastricht. Ankaŭ la ŝtataj ŝuldoj havas la plej favoran valorciferon. Tiel, la kredita indeco de Estonio estis altigita de ĉiuj agentejoj.

La malneta enlanda produkto tamen falis de 8,3 procentoj en 2011 al 1,1 procentoj en 2015, post ankoraŭa kresko je 2,9% en 2014.

La ĉefa ekonomia sektoro de Estonio estas la servoj, post kiu sekvas la industrio kaj la „origina“ sektoro (agrikulturo, ligno, fiŝkaptado, ĉasado kaj buĉado, uzado de akvo). Estonio mondfamas pro sia altevoluintaj kaj ege sukcesaj branĉoj de la elektroniko, informadiko kaj telekomunikado. La IT-infrastrukturo de Estonio estas modela kaj admirata en la tuta mondo. En la IT-branĉo ekzistas ĉirkaŭ 2900 entreprenoj, en kiuj laboras ĉirkau 21´000 homoj. Al la ĉefaj produktoj de tiuj branĉoj apartenas komputiloj, komputileroj, elektronikaj memorfiksiloj, fizikaj kaj optikaj datenportiloj, programado kaj administrado de datenoj. En la elektronika kaj elektroteknikaj branĉoj ekzistas ĉirkaŭ 170 firmaoj kun 9000 laboristoj. En 2015, ĉirkaŭ 850 milionoj da eŭroj de la malneta enlanda produkto koncernis la IT-branĉon. 17 procentojn de la serva sektoro konsistigis ekonomiaj kaj juraj konsilaj servoj kun ĉirkaŭ 5300 entreprenoj. La banka sektoro estas kontrolata de svedaj kaj finnaj bankoj, tra kiuj la investoj el tiuj landoj estas organizataj. Propraj estonaj bankoj praktike malaperis, ĉar ili estis glutitaj de finnaj kaj svedaj bankoj. La du ĉefaj svedaj bankoj nomiĝas ***Swedbank*** kaj ***SEB***, la finna banko nomiĝas ***Nordea Pank***. Aliaj pli grandaj bankoj estas Danske Bank kaj AS LHV Pank. Apud tiuj bankoj daŭre ekzistas la estonia nacia banko ***Eesti Pank***, kies ĉefa tasko estas gardi la stabilecon de la prezoj kaj efektivigi kelkajn respondecojn de la Eŭropa Centra Banko. Krom tio ekzistas proksimume 14 asekuraj firmaoj. Aliaj gravaj branĉoj estas la maŝina konstruado, metala prilaborado, transportado kaj bioteknologio. Al la ĉefaj bioteknologiaj kaj biomedicinaj branĉoj apartenas la esplorado de genoj kaj kanceraj malsanoj

kaj la imunologio. La sektoroj de la maŝina konstruado kaj metala prilaboro konsistigas 27 procentojn de la eksportoj kaj importoj de Estonio. En tiu sektoro funkcias ĉirkaŭ 1000 firmaoj kun 11´000 laboristoj. La ĉefaj eksportprodukoj estas fero kaj ŝtalo (30%) kaj produktoj konstruitaj el ili (37%). La plej multaj eksportoj iras al Svedio, Finnlando kaj Germanio.

La plimulto de la eksterlandaj entreprenoj estas reprezentataj en Estonio per lokaj partneroj (importistoj aŭ distribuantoj). En Estonio okazas pluraj foiroj, kiuj prezentas la produktojn de Estonio kaj de aliaj landoj.

Kiel konkludis la Estona Industria kaj Komerca Ĉambro, estonaj entreprenistoj estas sufiĉe optimismaj pri la estonteco. Ili planas koncentriĝi pri efektivigo de inovacioj kaj vidas la kreskon de la ekonomio kaj la obligon de laborlokoj pozitive, nome 53 procentoj inter lli. Eĉ pli multaj el ili optimismis rilate la kreskon de sia partopreno en la merkato (59%) kaj rilate la atendeblan enspezon (71%). Mait Palts, ĝenerala direktoro de la Ĉambro, diris, ke la malgrandaj kaj mezaj entreprenoj de Estonio serĉas eblojn por la ekspansio en novaj merkatoj.

Dum la sektoro de la malgrandaj kaj mezaj entreprenoj kreskas, la agrikultura produktado de Estonio malkreskis pasintjare je 19,8 procentoj, ampleksante 700 milionojn da eŭroj, kiel informis Eurostat. La produktado de cerealo malkreskis eĉ je 31,9%, la produktado de animalaj produktoj je 4,3% kaj la tuto de la agrikulturaj servoj je 2,2%. Cetere, ankaŭ la agrikultra produktado de Latvio malkreskis, nome je 8,3% en 2016, kaj tiu de Litovio je 4,6% do temas pri ĝen erala tendenco (la tuta agrikultura produktado de EU malkreskis en tiu jaro je 2,8%).

Nutraĵ-sektoro kaj la grandaj detal-komercaj superbazaraj ĉenoj

Tre fortaj estas la sektoroj de nutraĵoj kaj trinkaĵoj (lakto, fromaĝo, biero, vodko, viando), kiujn respegulas la ekspansiemaj entreprenoj, kiuj grandkvante vendas tiujn varojn (vd. sube). Do, malriĉecon en la baltaj landoj oni tute ne sentas, se oni vizitas la grandajn ĉenajn varvendejojn de la tipo „superbazaro“, kiuj etendiĝis en kaj ĉirkaŭ la urbocentro kaj kiuj vendas precipe manĝaĵojn kaj trinkaĵojn, ankaŭ alkoholajhojn. La ĉefaj nomiĝas ***Selver, Rimi, Prisma, Maxima, Stockmann.*** Tiuj grandaj vendejoj anoncis, ke ili intencas larĝigi sian spacon en la venontaj jaroj.[4]

La vendejo ***Selver*** estis konstruita en 1995 de la entrepreno „Tallinna Kaubamaja Grupo“, kiu mem ankoraŭ havas vendejon en la centro de la estona ĉefurbo. Post la ekspansio al Latvio en 2008 ĝi estis tamen devigita fermi tie ĉiujn 6 vendejojn pro la financa krizo. En decembro 2014 Selver funkciigis 44 vendejojn kun 83,9 mil kvadrataj metroj de vendospaco en Estonio. Selver estas la ekskluziva revendisto de ĉiuj produktoj de „Kuirejo de Selver“ kun pli ol 250 diversaj salatoj, desertoj, pretaj manĝoj k.a. Multaj produktoj estas importitaj el Finnlando, Danlando, Germanio, Nederlando kaj aliaj landoj de Eŭropa Unio.

La Grupo Tallinna Kaubamaja fermis la unuan kvaronon de 2015 per negocaj enspezoj de 123,5 milionoj da eŭroj, kio signifas pliiĝon de 3.2% en unu jaro.[5] En la unua triono de 2015 la enspezoj el la vendoj de la Selver-„superbazaroj“ sumigis 86,3 milionojn da eŭroj, do 4,7% pli kompare kun la antaŭa jaro. La neta perdo de la Selver-superbazaroj estis 1,2 milionoj da eŭroj, do la perdo pliiĝis je 0,1 milionoj da eŭroj dum tiu jaro. En la unuaj tri monatoj de 2015 8,2 milionoj da aĉetoj estis faritaj en la Selver-superbazaroj, kio kongruas kun stabila situacio.[6]

Rimi, kreita en 2004, venis al la baltaj landoj, kiam la finna konglomeraĵo ”Kesko” kaj la sveda “ICA Grupo” decidis ekspansii al tiuj landoj. La balta ĉefsidejo de Rimi troviĝas en Riga, Latvio. Rimi havas nuntempe 261 revendajn vendejojn, de kiuj 122 estas en Latvio, 83 en Estonio kaj 56 en Litovio. Fine de 2006 Kesko vendis sian parton de la baltaj vendejoj de Rimi al ICA, tiel ke ekde 2007 Rimi fariĝis suborganizaĵo de tiu sveda grupo.[7]

[4] Vd. https://en.wikipedia.org/wiki/List_of_supermarket_chains_in_Estonia.
[5] Vd. https://www.tkmgroup.ee/en/investor/turnover-tallinna-kaubamaja-group-increased-32-first-quarter.
[6] Vd. https://en.wikipedia.org/wiki/Selver.
[7] Vd. https://en.wikipedia.org/wiki/Rimi_Baltic.

Maxima estas litova entrepreno, kiu estis fondita en 1997 kaj funkciigas 500 vendejojn en Litovio (226), Latvio (141) kaj Estonio (21), sed ankaŭ en Pollando (21) kaj Bulgario (42). ”Maxima grupo” apartenas al la litova holdingo “Komerco de Vilnius” (“Vilniaus prekyba“), sed ĉiuj landaj entreprenoj estas memstaraj filioj. La grupo havis en 2014 31,569, nuntempe 29´500 kunlaborantojn. En 2008, la vendorezulto de “Maxima Grupo” estis 10 miliardoj da lidoj (kio tiam kongruis kun 2,8 miliardoj da eŭroj), en 2013 ĝi atingis 2,583 miliardojn kaj en 2015 2,7 miliardojn da eŭroj. En 2015, la tuta propra kapitalo estis 1,1 miliardoj da eŭroj.[8]

Laŭ informoj de la dogana kaj imposta oficejoj de Estonio, ***Maxima Eesi AS*** estis la plej granda unuopa komerca ĉeno de Estonio. Ĉi tiu firmao dungis 3666 kunlaborantojn en la tria kvarono de 2017. Post ĝi sekvis ***Selver AS*** kaj ***Rimi Eesti Food AS***, kun po 2640 kaj 2634 dungitoj.

Prisma apartenas al la finna revendista “S Grupo”, fondita en 1904, kaj havas 90 vendejojn en la plej grandaj urboj de Finnlando, Estonio kaj Ruslando. Ĝis 2017 la ĉeno havis ankaŭ filiojn en Latvio kaj Litovio. 39% de la enspezoj de la “S Grupo” originas de Prisma.

La plej fama kaj malnova inter ĉiuj grandaj varvendejoj de Baltio nomiĝas tamen ***Stockmann***. Ĉi tiu tradicia vendejo, kiu fariĝis legendeca, estis fondita de la germano Georg Stockmann (1825-1906), kiu venis en 1852 al Finnlando kaj malfermis dek jarojn poste sian varvendejon. La “akcia societo G.F. Stockmann” estis fondita en 1903 de Stockmann kaj ties du filoj. Ĝia ĉefa sidejo ĉe la Aleksandra Strato en Helsinko estis finkonstruita en 1930. En 1969 la vendejo translokiĝis al nova konstruaĵo de la finna arkitekto Alvar Aalto. Kun la pasado de la tempo estis fonditaj filioj en Tampere, Turku, Moskvo (1989), Tallinn (1996), Riga (2003) kaj Sankt-Peterburgo (2010). En 2014 Stockmann do havis naŭ varvendejojn en Finnlando kaj en la Baltaj Ŝtatoj plus sep en Ruslando. En Tallinn, “Stockmann” estas konsiderata kiel vendejo kun la plej bonkvalitaj (kaj plej multekostaj) nutraĵoj.[9]

Krom tiuj superbazaroj ekzistas en Tallinn ankaŭ aliaj grandaj vendocentroj kun multaj unuopaj vendejoj kiel ***Viru keskus***, ***Solaris*** kaj ***Kristiine***. La du ĉefaj librovendejoj nomiĝas ***Apollo*** kaj ***Rahva raamat*** kun libroj en la estona, rusa, angla, finna kaj germana lingvoj.[10]

Aliaj grandaj labordonantoj de Estonio ekster la nutraĵsektoro estas la Tallinna Malsanulejo (Ida-Tallinna Keskhaigla) kun 2388, la gasfirmao ***G4S AS*** kun 2343, la ***Estona Poŝto*** (Eesti Post) kun 2144 kaj ***Swedbank*** kun 2 138 kunlaborantoj.

Alkohola problemo

La prezoj por alkoholaĵoj, tabako kaj benzino kreskis en januaro 2018 pro la pli alta konsumimpostaĵo.

Latvio fariĝis por estonoj aparte alloga kaj inda celo por pli malmultekoste akiri alkoholaĵojn. En Latvio kaj Litovio la konsumimposto por forta alkoholo troviĝas sur simila pli malalta nivelo, dum en Estonio la imposto estas je 1,5 fojoj pli alta. En Latvio la imposto por biero estas 5% pli malalta ol en Litovio, sed en Estonio ĝi estas je 2,5-foje pli alta. Kiel montras la statistiko de Latvio, la alkoholaĵoj, kiuj estis aĉetataj ĉe la eston-latva limo, formis 13 procentojn aŭ 25,6 milionojn da eŭroj de la latvaj impostaj enspezoj el alkoholo. La imposta oficejo de Latvio raportis, ke en 2017 la ŝtato kolektis 198 milionojn da eŭroj el alkoholaj impostoj. De tiuj 25,6 milionoj originis el la limurboj Valka, Ainaži, Rujiena kaj Ape. En tiuj urboj apud la estona limo estis venditaj 8 milionoj da litroj da forta alkoholo kaj 16 milionoj da litroj da biero. En la unua kvarono de 2018 Latvio enspezis 48,1 milionojn da eŭroj el la alkohola imposto, kio signifis 9,1 milionojn pli ol en la pasinta jaro.

Pria esploro de la Estona Industria kaj Komerca Ĉambro montris, ke la parto de homoj, kiuj speciale veturas al Latvio por aĉeti alkoholaĵojn, kreskis, nome je 2,5 fojoj. En 2016 7 procenoj de la demanditoj aĉetis alkoholon en Latvio, en 2017 la procentaĵo jam atingis 18%. Granda problemo estas, ke multaj junaj homoj aĉetas alkoholon en Latvio. Plej ofte al Latvio veturas homoj inter 30- 48-jaraj, sed same ofte ankaŭ homoj inter 18- kaj 29-jaraj. Krom alkoholaĵoj, estonoj aĉetadas en Latvio ankaŭ

[8] Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Maxima_grupė.
[9] Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Stockmann_(Unternehmen).
[10] Vd. https://www.apollo.ee kaj https://www.rahvaraamat.ee/et.

nutraĵojn, tabakon kaj konstrumaterialon. Oni observis kreskon de minimume 20 procentoj por praktike ĉiuj varoj aĉetitaj en Latvio.

Similaj tendencoj estis konfirmitaj de la Estona Konjunktura Instituto, kiu same montris en nova studo de 2018, ke multaj estonoj speciale veturas al Latvio por aĉeti pli malmultekostan brandon, ofte en granda kvanto. Laŭ Marja Losing, direktorino de la Instituto, tio ne povas esti la ĝusta direkto de la alkohola politiko. Do, la registaran politikon de la konsuma imposto ŝi konsideras fiaskinta, ĉar la altigo de la impostoj, kiuj celis la redukton de la konsumo de alkoholo kaj fermi la truojn en la ŝtata budĝeto, ne atingis siajn celojn.

Alia fakto estas, ke multaj civitanoj el skandinaviaj landoj kaj precipe el Finnlando veturadas al Estonio por aĉeti alkoholaĵojn, kie ili estas kompare malpli kostaj por tiuj civitanoj, pro la manko de ŝtata monopolo, kiel ĝi ekzistas en skandinaviaj landoj. Nature, tiuj aĉetantoj, ĉefe turistoj, ne pagas alkoholan imposton en Estonio, sed precipe privataj vendejoj kaj restoracioj profitas de tiu abunda konsumado.

Salajroj kaj dommastrumaj elspezoj

La ekonomia evoluo en Estonio daŭre estas rapida, dinamika kaj pozitiva. Efektive, la averaĝa malneta salajro kreskis en Estonio en la pasinta jaro je 6,5 procentoj kaj atingis jarfine 1221 eurojn, kiel komunikis la Statistika Oficejo de Estonio. La malneta salajro kreskis en ĉiuj sferoj de la vivo. Plej altaj estis la salajroj en la branĉoj de la informadiko, financoj kaj asekuroj, kie ili atingis 2094 kaj 1996 eŭrojn. Plej rapide la salajroj kreskis en la montara konstruado (11,1%), informadiko kaj komunikado (10,2%) kaj en la energetiko (9,1%). En la sektoroj de la agrikulturo, forstado kaj fiŝkaptado la salajroj stagnis sur la nivelo de la antaŭa jaro. Tri foje pli malaltaj estis la salajroj sur la kampo de la servoj.

Diferencoj inter la privata kaj la publika sektoroj ekzistis nur malgrandaj. En la publika sektoro la salajroj troviĝis averaĝe ĉe 1265 eŭroj, en la privata sektoro ĉe 1206 eŭroj. La averaĝa pohora salajro do mezuriĝis per iom pli ol 7 eŭroj. Sed la realaj salajroj kreskis pli malrapide, se oni konsideras la influon de la inflacio. Sufiĉe grandaj diferencoj estis tamen konstateblaj en la diversaj regionoj de Estonio. La plej altan salajran nivelon atingis la regiono Harjumaa ĉirkaŭ la ĉefurbo Tallinn, kie la salajra averaĝo estis inter 1337 kaj 1353 eŭroj. En Tartu la nivelo de la salajroj estis 1199-1215 eŭroj. Plej malalta ĝi estis sur la insuloj Hiumaa (879-883 eŭroj) kaj Saaremaa (862-876 eŭroj).

Resume, la salajroj en Estonio kreskis en la plej lasta kvarono de la pasinta jaro (2017) je 8,2 procentoj. Kun tiu rezulto Estonio apartenas al la gvidaj landoj de Eŭropa Unio, kie la salajroj kreskis sur tiu nivelo nur en Rumanio (14,3%), Bulgario (12,2%), Hungario (8,6%) kaj Litovio (8,3%), dum en la cetera unio ĝi kreskis nur je 1,5-2,3 procentoj.

Swedbank prognozis por la jaro 2018 3-procentan kreskon de la prezoj. Laŭ ĝia kalkulo, la averaĝaj malnetaj salajroj kreskos pli rapide, nome je 6 procentoj.

La rentoj por pensiuloj kaj monhelpoj al laboristoj daŭre estas malaltnivelaj en Estonio. La registaro de Estonio decidis altigi ilin je la 1a de aprilo 2018 je averaĝe 7,6 procentoj, kio kostos la ŝtaton 97,6 milionoj da eŭroj en ĉi tiu jaro. Do, la alteco de la nova rento estos 446,5 eŭroj. La konsumpreza indekso kreskis en la pasinta jaro je 3,4 procentoj. En 2017 en Estonio, kiu havis je la unua de januaro 2016 1´315´944 loĝantojn, laboris 730´301 personoj, de kiuj 157´685 estis rentuloj.

Laŭ la kalkulo de la Financa Instituto de Swedbank, la vivo en Riga (Latvio) estas pli multekosta ol en Tallinn kaj Vilnius. Tiel, averaĝa familio konstanta el du plenkreskuloj kaj du infanoj elspezas meze 617 eŭrojn ĉiumonate, t.e. 39% de sia monata enspezo, por nutraĵoj, loĝado (en loĝejo kun sovetia standardo) kaj transporto. En Tallinn sama familio pagas 510 eŭrojn, t.e. 21% de sia monata enspezo, kaj en Vilnius necesas pagi 486 eŭrojn aŭ 31% de la monata enspezo por similaj varoj kaj servoj. Laŭ detalaj indikoj, en Riga la unuopaj varoj aŭ servoj kostis en 2017 344 eŭrojn por nutraĵoj, 172 eŭrojn por la loĝejo kaj 100 eŭrojn por la transporto. En Tallinn tiuj produktoj kaj servoj kostis 329 kaj 180 eŭrojn, dum la publika transporto en Tallinn estas senpaga por loĝantoj de la ĉefurbo (!!!). En la kazo de Vilnius la ĉi-koncernaj ciferoj estas 293, 128 kaj 64 eŭroj.

En 2017, la disponebla neta enspezo de la dommastrumaj unuoj estis 2433 eŭroj en Tallinn, 1601 eŭroj en Riga kaj 1559 eŭroj en Vilnius.

En Estonio la konsumantoj elspezas la plej grandan parton de sia enspezo por nutraĵoj (25%). En 1993 tiu parto de la familia budĝeto ankoraŭ estis 44%. Kun la kreskanta materia bonfarto la elspezoj por nutraĵoj kaj loĝado falis. Aliflanke kreskis la personaj elspezoj ekzemple por distrado kaj hobioj. Alifanke, la ĝenerala preza nivelo duobliĝis kompare kun la nivelo de la jaro 1995. Samtempe kreskis la averaĝa malneta salajro je 8 fojoj kaj la averaĝa pensiula rento je 9,5 fojoj.

MNP

Rilate la malnetan enlandan (nacian) produkton, Estonio situis, laŭ la kalkulo de la Monfonduso, kun 22,5 miliardoj da dolaroj en 2017 kaj 23,1 miliardoj da dolaroj en 2018 sur la 104a rango de 191 landoj, do ĝi situis en la statistika proksimeco de Honduraso kaj Ugando. Iom pli bonan poziciojn havis Litovio kaj Latvio.

"Ombra" ekonomio

Granda problemo estas la ***„ombra" ekonomio*** en la Baltaj Ŝtatoj. Pria esploro de la Stokholma Lernejo por Ekonomio en Riga montris, ke la parto de la „ombra" ekonomio en Estonio kreskis en la pasinta jaro je 2,8 procentoj kaj atingis 18,2% de la malneta enlanda produkto. Same alta ĝia nivelo estas en Litovio, dum en Latvio ĝi mezuras eĉ 22%. Ombra ekonomio signifas ekonomiajn aktivecojn, kiuj ne estas fiksataj de ŝtata regulado, ne estas kaptataj de la impostoj kaj entute ne aperas en la ŝtata statistiko. Ĉefaj formoj de la ombra ekonomio estas nigra merkato kaj nigra laboro, do ekster- aŭ kontraŭleĝaj, fakte malpermesataj formoj de merkato kaj laboro. La ĉefaj negativaj sekvoj de la nigraj merkato kaj laboro estas mankantaj impostaj enspezoj kaj pagoj al la socialaj kasoj. Por kompari: En Germanio la parto de la ombra ekonomio estas inter 12% kaj 13%, en Hispanio ĝi estas 18,2%, en Italio 20,1%, en Grekio 22,4%, en Svislando 6,5% kaj en Usono 5,9%.

Korupto kaj monlavado

Laŭ la Indekso pri korupto de Transparency International, Estonio okupis en 2016 la 22an rangon antaŭ Francio (23), Litovio (38) kaj Latvio (44). Plej malaltaj tiuj rangoj estas en Danlando (1), Finnlando (3), Svedio (4), Svislando (5) kaj Norvego (6). Ruslando kaj Ukrainio okupis la 131an de 176 rangoj.[11] Estas malfacile diri, ĉu la relative altaj pozicioj de la Baltaj Ŝtatoj rilate la ombran ekonomion kaj korupton estas ŝuldata al la sovetia heredaĵo, al la relativa malriĉeco de tiuj landoj aŭ al la nesufiĉa konscio pri la neceso de la financado de la ŝtato.

Kiel en septembro 2018 fariĝis konate, granda parto de ĉirkaŭ 200 eŭroj aŭ 234 milionoj da dolaroj, kiuj en la tempo inter 2007 kaj 2015 fluis tra Nederlando al la estona filio de Danske Bank en Tallinn, devas esti eventuale konsiderata kiel suspektindaj transpagoj, nome en formo de lavita mono. Temas pri mono el Ruslando kaj aliaj eksaj sovetiaj respublikoj. La banko ignoris ĉi-rilatajn avertojn de aŭditoroj el Estonio, pro kio ĝiaj ĉefoj, Ole Andersen kaj Thomas Borgen, konfesis erarojn de la banko koncerne la respondecon kaj anoncis sian demision.[12]

Elpelo de eksterlandanoj el Finnlando pro lezo de finnaj leĝoj

En la pasinta jaro (2017) la finna polico elpelis entute 2621 eksterlandanojn el Finnlando, ĉar ili malrespektis iujn finnajn leĝojn. La plej granda parto de la elpelitoj koncernis estonajn civitanojn, nome

[11] Vd. https://en.wikipedia.org/wiki/Corruption_Perceptions_Index.

[12] Vd. https://deutsche-wirtschafts-nachrichten.de/2018/09/19/danske-bank-234-milliarden-dollar-potentiell-verdaechtige-zahlungen, https://deutsche-wirtschafts-nachrichten.de/2018/09/19/danske-bank-234-milliarden-dollar-potentiell-verdaechtige-zahlungen

619. Pro la samaj kaŭzoj el Finnlando estis elpelitaj ankaŭ 290 rusoj, 154 irakanoj, 150 italoj, 130 svedoj, 31 litovoj kaj 16 latvoj

Eksportoj kaj importoj

En 2017 la eksportoj de Estonio kreskis, kompare kun 2016, je 8 procentoj, dum la importoj de la lando kreskis je 9 procentoj en la sama periodo. La tuta amplekso de la eksportoj mezuris 12,8 miliardojn da eŭroj, dum la importoj atingis 14,7 miliardojn. La komerca deficito estis 1,9 miliardoj da eŭroj. La deficito rezultiĝis precipe pro la troa importo de transportiloj, precipe ŝipoj, krome de naturaj resursoj kaj varoj de la kemia industrio. La plej granda parto de eksportoj koncernis lignon kaj lignajn varojn same kiel diversajn industriajn produktojn, ekzemple meblojn. Tiel, la lignaj produktoj anstataŭis la elektrajn produktojn de la unua rango de la pasinta jaro. 71% de la eksportoj iris al la landoj de EU, dum 82% de importoj originis el EU-landoj. La kresko estis 4, resp. 9 procentoj. Eĉ pli forte kreskis la komerco kun landoj ekster EU, kie la eksporto atingis 18% kaj la importo 11%. La ĉefaj komercaj partneroj de Estonio estis en 2017 Finnlando (16% de ĉiuj eksportoj), Svedio (14%), Latvio (9%). La plej grandan kreskon spertis la eksportoj al Finnlando, poste al Ruslando kaj Germanio. La landoj kun la plej granda malkresko de eksportoj estis Svedio, Meksikio kaj Niĝerio.[13]

Ŝtataj financoj

La ŝtata budĝeto de Estonio ampleksis en 2016 elspezojn de 9,559 miliardoj da dolaroj kaj enspezojn de 9,489 miliardoj da dolaroj. Per 0,1% de la ekonomia potenco la deficito do estis minimuma. La ŝtataj ŝuldoj de 2016 estis 9,5% de la ekonomia potenco, per kio Estonio estis la lando kun la plej malaltaj ŝuldoj en tuta EU. La ŝtataj elspezoj dispartiĝas laŭ procentoj de la malneta enlanda produkto al jenaj sektoroj: Sano: 13,4 % (2014), klerigo: 6,4 % (2012), armeo: 2,0 % (2014). Kvankam antaŭvidi deficiton en la ŝtata budĝeto ne estas malpermesata de la konstitucio, la celo de la registaroj kaj komunumoj de Estonio estas atingi ekvilibron kaj disciplinon. La eldono de cirkulanta mono (t.e. banknotoj kaj moneroj) kaj la kapitalo de la komercaj bankoj devas esti kovritaj per oro kaj havaĵoj en fremdaj devizoj.

La aldonvaloro imposto (estonlingve: käibemaks) estas 20% (reduktita: 9%).[14]

Trafika infrastrukturo

La rela trafiko de Estonio estas garantiata de la ŝtata firmao ***AS Eesti Raudtee***, kiu okupiĝas pri vara transporto, dum la firmaoj ***Elron*** transportas personojn enlande kaj ***Edelaraudtee*** prizorgas la infrastrukturon.[15]

Dum longa tempo la ***fervoja trafiko*** de Estonio estis neglektata kaj lamis pro la fiaskinta privatigo de la fervojo kaj pro la ĉesigo de multaj enlandaj linioj, tiel ke ĝi preskaŭ tute perdis sian signifon, ankaŭ pro la forta konkurenco de la kreskanta, pli moderna kaj rapida bustrafiko. En la jaroj 2013-14 la tuta malnoviĝinta estona trajnaro estis elŝanĝita per novaj modernaj kaj dizelelektraj trajnoj de la tipo „Stadler FLIRT“ el Svislando kun unuaklasaj vagonoj kaj konekto kun la interreto. Post tiu renovigo la nombro de pasaĝeroj denove kreskis. La fervojoj de Estonio priservas la liniojn Tallinn-Tartu-Valga kaj Tallinn-Narva, kun bele renovigitaj malnovaj stacidomoj kiel ekzemple en Tartu. La centra stacidomo de Estonio troviĝas en Tallinn (Balta Stacidomo). La internacia trajntrafiko de Estonio limiĝas al fervojaj linioj al Ruslando (Sankt-Peterburgo kaj Moskvo), sed tiuj trajnoj ne estas tre fidindaj, ĉar pro diversaj problemoj en Ruslando ili ofte ne veturas, kaj pasaĝeroj kun ruslanda civitaneco bezonas

[13] Vd. https://www.nordisch.info/estland/aussenhandel-schwingt-sich-zu-neuen-rekorden-auf, https://de.statista.com/statistik/daten/studie/15639/umfrage/handelsbilanz-von-estland.
[14] Vd. http://www.die-mehrwertsteuer.de/de/umsatzsteuer-estland.html.
[15] Vd., https://de.wikipedia.org/wiki/Elron, https://de.wikipedia.org/wiki/Edelaraudtee, http://www.baltijaam.ee, https://de.wikipedia.org/wiki/Stadler_Flirt, https://de.wikipedia.org/wiki/Schienenverkehr_in_Estland,.

vizon por eniri Estonion. La tuta longeco de la fervojaj linioj de Estonio ampleksas 1200 kilometrojn. 88 procentojn de la transportoj konsistigas varoj. La EU-projekto „Rail Baltica“ planas konstrui fervojan ligon de Tallinn kun meza kaj suda Eŭropo.

Kun la haveno de Tallinn Estonio disponas pri mezgranda sed tre moderna ***haveno***, kun rektaj rilatoj al Ruslando kaj la Malproksima Oriento.[16] Krom tio, Estonio havas 44 malgrandajn havenojn, tra kiuj la diversaj, ofte malfacile atingeblaj punktoj de la lando estas atingeblaj. La dua kaj tria plej grandaj havenoj troviĝas en Pärnu kaj Sillamäe.

La ĉefa internacia flughaveno de Estonio estas la ***flughaveno „Lennart Meri“***. Al Tallinn rekte flugas aviadialoj esence el Finnlando, Svedio, Danlando, Norvegio, Germanio, Nederlando, Belgio, Francio, Britio, Aŭstrio, Latvio, Litovio, Pollando, Ruslando kaj kelkaj aliaj landoj.[17] Dum la feria sezono veturas diversaj turismaj flugoj al Greklando, Turkio, Egiptio, Kroatio, Malto k.a. direktoj. En 1992 tra la flughaveno pasis ankoraŭ 205´776 pasaĝeroj, en 1997 502´442, en 2004 estis jam preskaŭ miliono. En 2014 tra la flughaveno de Tallinn estis transportitaj 2´017´371 milionoj da pasaĝeroj, en 2017 2´648´361. Post la bankrotiĝo de la iama estona flugkompanio „Estonian Air“ (2015)[18] anstataŭe flugas nun la kompanio „Nordica“, kiu estas posedata de la ŝtato kaj partnere kunlaboras kun la pola flugkompanio LOT (kiel membro de Star Alliance), kiu posedas 49 procentojn.[19] Pro la fifamaj malfruiĝoj „Nordica“ (kaj LOT mem) ne estas tre ŝatata de la klientoj. Krom tio, ekzistas dua internacia flughaveno en Tartu[20] kaj malgrandaj flughavenoj en Pärnu, Kuressaare (Saaremaa) kaj Kärdla (Hiiumaa) kiel ankaŭ sur la insuletoj Kihnu kaj Ruhnu.

Ĉar la flughaveno de Tallinn situas tre proksime de la urbocentro, oni povas veturi ekde la pasinta jaro per la urba tramo en kelkaj minutoj de la flughaveno rekte´al la centro.

La ***strata reto*** de Estonio ampleksas ĉirkaŭ 16´500 kilometrojn, kiuj estas ŝtataj stratoj. Trioblon de tio konsistigas regionaj kaj privataj stratoj. La ĉefaj stratoj kondukas de Tallinn al Narva (nacia strato n-ro 1), Tartu (nacia strato n-ro 2) kaj Pärnu (macia strato n-ro 4 au E 67 aŭ „Via Baltica”). Kiel nova nacia strato (n-ro 11) estiĝos la strato ĉirkaŭ Tallinn. Nur proksimume 30% de la stratoj estas asfaltitaj. Ofte la stratoj estas en malbona stato, kaj ekzistas sennombraj riparadoj, kiuj malhelpas la glatan fluon de la trafiko. En Tallinn ofte okazas ŝtopiĝo de la trafiko, precipe antaŭ la komenco la laborhoroj kaj post kiam ili finiĝis.

Dum apartaj stratoj por bicikloj ankoraŭ mankas, Estonio disponas, kiel unua lando de EU kaj de la mondo, tutlandan publikan sistemon por reŝargi bateriojn por elektraj aŭtomobiloj. Ekzistas proksimume 165 stacioj (intertempe verŝajne pli), kiuj funkcias laŭ la sistemo CHAdeMO kaj troviĝas maksimume 40-60 kilometroj unu de la alia. Oni povas trovi ilin per Smartphone-aplikaĵo. Per tio oni celas disponigi vastan, rapide disponeblan kaj relative malmultekostan elektran moveblon en la tuta lando. La ŝargo de la baterio daŭras tridekon da minutoj. Nur en Norvegio ekzistas pli vasta sistemo de elektraj aŭtomobiloj. Dum Norvegio havas po 4 elektraj aŭtomobiloj por 1000 enloĝantoj, Estonio havas po 1.

Alia interesa novaĵo estas la ***memstare stirantaj busoj***. En Tallinn komencis eksperimente veturi tia buso de la tipo „Last-mile“. Tio signifas, ke tia buso veturas inter la priservata bushaltejo kaj la fina celo de la pasaĝero. En somero 2017 en la centro de Tallinn tia buso eksperimente veturis laŭ unu linio inter du haltejoj, dum la ĝenerala trafiko estis fermita. La urbo intencas testi tiajn busojn ankaŭ sub normalaj trafikaj kondiĉoj. La projekto, kiu dume estis ĉesigita, estis komuna ideo de la urbo Tallinn kaj de la Teknika Universitato de Tallinn. En Skandinavio similaj projektoj estas testataj jam de jaroj.[21]

Post kiam la civitanoj de Tallinn decidis pri senpaga uzado de busoj kaj tramoj, ekde 2013 la loĝantoj de la ĉefurbo rajtas veturi senpage per tiuj transportiloj, dum eksteraj homoj, gastoj kaj turistoj daŭre devas pagi tiujn servojn. En la bus- kaj tramtrafikon estis enkondukita nova praktika bileta

[16] Vd. http://www.portoftallinn.com.
[17] Vd. https://en.wikipedia.org/wiki/Tallinn_Airport kaj https://www.tallinn-airport.ee/en.
[18] Vd. https://en.wikipedia.org/wiki/Estonian_Air.
[19] Vd. https://en.wikipedia.org/wiki/Nordica_(airline) kaj
[20] Vd. https://en.wikipedia.org/wiki/Tartu_Airport kaj https://www.tartu-airport.ee.
[21] Vd. https://www.err.ee/615032/ilma-juhita-bussid-lopetasid-tallinnas-soitmise.

sistemo, kaj ekde kelkaj jaroj en Tallinn cirkulas modernaj klimatizitaj tramoj, kiuj estis aĉetitaj en Hispanio.

Por plibonigi kaj rapidigi la trafikon ne mankas ideoj en la baltaj landoj. Peter Vesterbacka,[22] la inventinto de komputila ludaro „Angry Birds“,[23] revas pri tunelo inter Tallinn kaj Helsinko sub la Finna Maro kaj esperas, ke tiu projekto estos realigita ĝis Kristnasko 2024. La konstruado de tia tunelo daŭrus kvin jarojn, en kazo de neantaŭviditaj obstakloj pli longe. La konstrulaboroj kostus minimume 15 miliardojn da eŭroj. 37 jarojn poste la kostoj estus amortizitaj. Vesterbacka diris, ke la tunelo, kiun reprezentos privata projekto, estos financata je 70% per la rimedoj de ĉinaj investantoj. La resto estu ĉerpita el loka fonduso. Laŭ la vizio de Vesterbacka, la tunelo havos kvar haltejojn: en Tallinn, la dua 15 kilometrojn antaŭ Helsinko, la tria en Otaniemi kaj la kvara en la flughaveno de Helsinko. La veturo inter Tallinn kaj la finna flughaveno daŭrus 20-25 minutojn. En la tunelo veturus trajnoj kun rapideco de 350-400 kilometrojn hore. Tia tunelo estus la plej longa de la mondo, kaze ke ĝi estos konstruita.

Dume inter Tallinn kaj Helsinko cirkulas pluraj grandaj ***ŝipoj***. La plej nova (12-etaĝa dizel-elektrika) ŝipo, MS „Megastar“ de la ŝipvetura kompanio Tallink,[24] komencis veturi en januaro 2017. Ĝi estis konstruita de la firmao Meyer Turku (Finnlando), kostis 230 milionojn da eŭroj, havas longecon de 212 metroj kaj pezas 49 mil tunojn. Ĝi povas transporti 2800 pasaĝerojn,[25] sed akceptas ankaŭ centojn da aŭtomobiloj kaj kamionoj, veturas sesfoje tage inter Tallinn kaj Helsinko kaj bezonas por tiu 87-kilometra veturo[26] du ho-rojn. Unuopa bileto kostas inter 40 kaj 50 eŭroj. La du aliaj, pli malnovaj ŝipoj de Tallink, kiuj veturas inter la ĉefurboj de ambaŭ landoj, nomiĝas MS „Star“ (2007)[27] kaj MS „Silja Europa“ (1992)[28]. Krom tio, la linio de Eckerö ofertas kun sia ŝipo MS „Finlandia“ noktan turisman veturon.[29]

Alia avangarda trafika projekto koncernas la konstruadon de ponto(j) inter la kontinento kaj la estonaj insuloj, precipe Saaremaa. La estona entreprenisto Raivo Hein esperas efektivigi tian planon jam en la jaro 2020 per ponto al la insulo Muhu. La laboro daŭrus tri jarojn kaj la kostoj estus 500 milionoj da eŭroj, komunikis la loka gazeto *Saarte Hääl*. Laŭ la imago de Hein ekzistus estonte ankoraŭ du aliaj pontoj inter Saaremaa kaj Hiiumaa. Ankaŭ en tiu ĉi kazo ne estus la ŝtato, kiu estus petita financi la projekton, sed la necesan kapitalon disponigus ĉefe privataj entreprenistoj, rentaj fondusoj kaj bankoj el Estonio kaj Skandinavio. La entreprenoj, kiuj veturigas ŝipojn inter la kontinento kaj la estonaj insuloj, kontraŭstaras tiajn projektojn, ĉar ili timas perdi klientojn. En 2017 la firmao TS Laevad, kiu funkciigas la ŝiptrafikon inter la kontinento kaj Saaremaa, transportis 1,66 milionojn da pasaĝeroj kaj 0,71 milionojn da veturiloj.

Turismo

Estonio kaj la Baltaj Ŝtatoj estas vizitataj de pli kaj pli multaj eksterlandaj turistoj el la tuta mondo. Laŭ la statistika oficejo de Estonio, en la pasinta jaro (2017) tranoktis en hoteloj de la lando pli ol 3,5 milionoj da estonaj (1,39 mio.) kaj eksterlandaj (2,15 mio.) turistoj, kio signifas entute 7 procentojn pli ol en 2016. La kresko estis 9% ĉe estonoj kaj 5% ĉe eksterlandanoj. Plej multe kreskis la parto de vizitantoj el aliaj EU-landoj, sed kreskis ankaŭ la parto de turistoj el Ruslando kaj Azio. 42 procentojn de la tuta nombro de turistoj formis finnoj, kio estis 4% malpli ol en 2016. 72% de la hotelvizitantoj estis privatuloj kaj 21% komercistoj. Eksterlandaj turistoj elspezis en Estonio ĉirkaŭ 1,2 miliardojn da eŭroj.

Laŭ la statistiko de la Estona Nacia Banko, estonaj turistoj elspezis en 2017 800 milionojn da eŭroj, 50 milionojn pli ol en la antaŭa jaro. 80% de iliaj vojaĝoj okazis ene de Eŭropa Unio, 100 mil pli kompare kun la antaŭa jaro. Ĉiu kvina vojaĝo, do 20% de la vojaĝoj, kondukis la estonojn al Finnlando.

[22] Vd. https://fi.wikipedia.org/wiki/Peter_Vesterbacka (disponebla nur en la finna lingvo).
[23] Vd. https://en.wikipedia.org/wiki/Angry_Birds kaj https://www.youtube.com/watch?v=RlQSC60PoMM.
[24] Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Tallink
[25] Vd. https://en.wikipedia.org/wiki/MS_Megastar
[26] Vd. https://www.luftlinie.org/Helsinki/Tallinn
[27] Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Star_(Schiff)
[28] Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Silja_Europa
[29] Vd. http://www.nordicmarketing.de/eckeroe-line-vermehrte-abfahrten-zwischen-helsinki-und-tallinn/

Konsiderinde pli multe kreskis iliaj vojaĝoj al Bulgario kaj Greklando, dum al Kroatio la vojaĝoj trioblighis en la pasintaj dek jaroj.

Laŭ la novaĵagentejo BNS, Tallinn atendas en 2018 342 krozoŝipojn kun 565´000 pasaĝeroj, kio post la pasinta jaro, kiam en Tallinn alvenis 311´000 tiaj turistoj, verŝajne signifos novan rekordon en tiu ĉi rilato. La 2an de julio estis atendataj 11´400 vizitantoj. „MSC Meraviglia“ (Malto), kiu havas lokon por 5500 pasaĝeroj, estos la plej granda krozoŝipo, kiu haltos en la haveno de Tallinn.

Kiel raportis la rusa novaĵagentejo Interfax, surbaze de la statistika oficejo de la Rusa Federacio, Estonio troviĝis inter la plej popularaj vojaĝceloj por rusaj civitanoj aŭ turistoj. Malgraŭ la malagrabla viza devigo, la nombro de la rusaj vojaĝantoj al Estonio kreskis en 2017 je 14,4 procentoj kaj sumiĝis je 1,7 milionoj da personoj.

En Tallinn ekzistas dekoj da hoteloj de diversaj prezkategorioj. Ses kvinstelaj hoteloj nomiĝas Radisson, Swissôtel, St. Petersbourg Hotel, Schlössle, The Three Sisters Boutique Hotel, kaj Savoj Boutique. Krom tio ekzistas ne malmultaj kvarstelaj hoteloj (kiel Sokos Viru, Olümpia, Kalev Spa, Nordic Hotel Forum, Tallinnk City Hotel, Hestia Hotel Europa, Hestia Hotel Ilmarine, Hotel Rocca al Mare, Hotel Ülemiste, von Stackelberg Hotel, Hotel Palace, St. Olav Hotel, Hotel Imperial, Hotel L´Ermitage, Hilton Tallinn Park, CRU Hotel, Tallink Spa & Conference Hotel, Meriton Old Town Garden Hotel, Merchants House Hotel, Soko Sokos Hotel Estoria, Baltic Hotel Vana Viru, My City Hotel, k.a.). La prezoj estas internaciaj, sed kelkfoje ili tamen povas esti eble iom pli malaltaj ol en okcidenta Eŭropo.

Sennombraj restoracioj kaj trinkejoj provizas la loĝantojn kaj vizitantojn de Tallinn per larĝa oferto de manĝaĵoj kaj trinkaĵoj. La prezoj de tiuj servoj estas kompareblaj kun tiuj de Germanio, en kelkaj kazoj (kiel biero kaj vino) eble pli altaj, sed pli malmultekostaj ol en Skandinavio kaj Finnlando.

Inter la plej allogaj kaj vizitindaj lokoj de Estonio elstaras krom Tallinn, kiu havas unike belegan mezepokan urbokernon, la insulo Saaremaa kaj kelkaj aliaj insuloj kun sia bela mara naturo, la urbo Tartu, kie situas fama universitato, kaj la kuracloko Pärnu, kiu disponas pri multaj hoteloj kaj sanatorioj kun mara naĝplaĝo. En Estonio la vetero ofte estas pluva, ventema kaj malvarma, sed en la lastaj jaroj la meterologoj registris nekutime varmajn periodojn en printempo kaj somero, kun temperaturoj de pli ol 30 gradoj, je la granda ĝojo de la estonoj kaj eksterlandaj turistoj.

La ĉefa kultura evento de Estonio estas la tradicia estona ***kant- kaj dancfesto*** (Laulupidu ja tantsupidu[30]) en Tallinn kun siaj dekmiloj da partoprenantoj kaj vizitantoj, kiu okazas ĉiujn kvin jarojn kaj allogas dekmilojn da homoj el en- kaj eksterlando. Krom tio en somero kutime okazas la fama bier- kaj muzikfestivalo (Õllesummer[31]), la Tagoj de la Malnova Urbo (Vanalinna päevad[32]) kaj la Maraj Tagoj (Tallinna Merepäevad[33]), kiuj allogas dekmilojn da vizitantoj kaj proponas koncertojn, foirojn kaj gastronomion.

Turisma-kultura kulmino en Estonio estas la kelkcent unikaj iamaj nobelbienoj (Eesti mõisad/ manors) el la baltgermana tempo, kiuj parte estas renovigitaj kaj funkcias kiel hoteloj aŭ konferenc-centroj. Nova estona mapo indikas 670 tiajn bienojn kaj 100 parkojn.[34]

La muzeoj de Estonio estas pli modeste ekipataj ol la grandaj kaj famaj muzeoj de okcidenta Eŭropo. La plej nova muzeo estas la Nacia Muzeo de Estonio, kiu estis inaŭgurita en 2016 en Tartu. La muzeo kun sia finnugra fokuso eble imponas pro siaj moderna ekstera fasado kaj nekutima situo ekster la urbocentro, sed la ekspozicio mem estas tamen parte bedaŭrinde seniluziiga. Aliflanke, la libroven-dejo havas sufiĉe multajn interesajn varojn por aĉeti.[35]

La ĉefaj vojaĝoficejoj de Estonio nomiĝas ***Estonian Holidays AS***, ***Estravel AS*** kaj ***Kaleva Travel Estonia***.

[30] Vd. http://2019.laulupidu.ee kaj http://2019.laulupidu.ee/tantsupidu.
[31] Vd. http://www.ollesummer.ee.
[32] Vd. http://vanalinnapaevad.ee/avaleht.
[33] Vd. http://tallinnamerepaevad.ee/et.
[34] Vd. ankaŭ http://www.mois.ee.
[35] Vd. https://en.wikipedia.org/wiki/Estonian_National_Museum.

Gazetaro

La ĉefaj estonaj gazetoj nomiĝas ***Postimees***[36], ***Päevaleht***[37] kaj ***Õhtuleht***[38] la plej signifa ekonomia gazeto estas ***Äripäev***[39] kaj la gazeto por la agrikulturo estas ***Maaleht***[40]. Krom tio ekzistas amaseto da estonlingvaj ĵurnaloj (pri modo, kuirarto, ĝardenumado k.s.) kaj iuj ruslingvaj gazetoj kiel ***Den za Dnjom***[41]. La ĉefa anglalingva gazeto nomiĝas ***The Baltic Times***[42], kiu kaj entenas novaĵojn pri ĉiuj tri baltaj landoj. La german-lingvaj periodaĵoj ***Baltische Rundschau***[43] kaj ***Das Baltikum***-Blatt[44] aperas en la interreto.

Sur la kampo de la televido ekzistas ŝtata televida stacio[45] kaj kelkaj privataj kanaloj[46]. La du ĉefaj radiostacioj nomiĝas „Raadio KUKU“[47] kaj „Raadio 2“[48]. Grava platformo kun ampleksa raportado pri eventoj en la baltaj landoj estas la platformo ***Delfi***[49].

Interreto

En Estonio la interreto havas ege gravan, unikan, kvazaŭ sanktan statuson, ĉiukaze legendan historion. De la jaro 2000 la ŝtato garantias per leĝo al ĉiuj civitanoj aliron al la interreto. En la tuta lando ekzistas WLAN-punktoj, kiuj kovras la tutan teritorion per senpaga reto, almenaŭ 99-procente. Kiu mem ne posedas komputilon, tiu rajtas senpage utiligi la reton ĉe unu el la 700 publikaj stacioj en poŝtoficejoj, bibliotekoj aŭ vilaĝaj butikoj. Ĉiuj lernejoj estas ligitaj kun la interreto. Ĉiu civitano posedas ID-numeron. Estonio disponas pri la plej multaj interretaj konektoj po persono en la mondo. Estonio asertas, ke ĝi havas ankaŭ la plej modernan administran sistemon en la mondo. De 2007 la estonoj povas rete partopreni en elektoj kaj balotoj, finkalkuli siajn impostojn kaj ricevi receptojn de la kuracisto. Pro la danĝero esti damaĝata de kiberatakoj fare de (probable rusaj) hakeroj, troloj[50] kaj kiberkrimuloj – en aprilo 2007 fakte okazis tia grandstila atako, kiu kolapsigis la komputilojn de ŝtataj instancoj, gazetaroj kaj bankoj en Estonio – oni instalis rezervajn komputilojn en Luksemburgo, kiuj entenas la estonan administran softvaron kaj la datenojn de la civitanoj.

Dank´ al tre potenca IT-sektoro Estonio estas unu el la plej avangardaj kaj progresemaj landoj sur la kampo de la e-administrado. Ekde januaro 2015 Estonio ebligas al la civitanoj de multaj landoj t.n. e-rezidejon. Tiuj e-rezidantoj tamen ne aŭtomate fariĝas ankaŭ civitanoj aŭ loĝantoj de Estonio kaj ne povas utiligi la rajtojn de estonaj civitanoj. Sed ili sole posedas digitalan identecon, kiu povas esti ricevita post ekzamenado fare de la estona limprotekta oficejo, post administra prilaborado, kiu daŭras kelkajn semajnojn, kaj post pago de ĉirkaŭ cent dolaroj (marto 2016) en formo de karto kun legilo aŭ en Estonio aŭ ĉe la ambasadoj de Estonio. Ĉi tiu identiga sistemo permesas la kreadon de digitalaj subskriboj, la kodigon de dokumentoj, la utiligon de la ŝtata portalo eesti.ee, la fondon de entreprenoj en Estonio, la retan verkadon kaj transdonon de la impostdeklaro kaj la malfermon de bankaj kontoj post unufoja sinprezento en iu estona banko. Ĉion tion la estonaj civitanoj povas fari jam de longe. La projekto estas gvidata de la oficejo por komunikad- kaj informsistemo de la ministerio de la ekonomio. Ĝia estro Taavi Kotka estas ankaŭ la fondinto de Skajpo, kiu same estas estona inventaĵo, kiu poste estis

[36] Vd. http://www.postimees.ee
[37] Vd. http://www.epl.ee aŭ http://www.paevaleht.ee.
[38] Vd. http://www.ohtuleht.ee.
[39] Vd. http://www.aripaev.ee.
[40] Vd. http://www.maaleht.ee.
[41] Vd. http:/www.dzd.ee.
[42] Vd. http://www.baltictimes.com.
[43] Vd. https://baltische-rundschau.eu.
[44] Vd. http://www.baltikum-blatt.eu.
[45] Vd. http://www.etv.ee.
[46] Vd. http://www.tv3.ee kaj http:/www.kanal2.ee.
[47] Vd. http://www.kuku.ee.
[48] Vd. http://www.r2.err.ee.
[49] Vd. http://www.delfi.ee.
[50] Laŭ gazetaraj raportoj kaj rakontoj de kunlaborintoj, en Sankt Peterburgo funkcias aŭ funkciis „fabriko de troloj“, kiu produktis/as manipulitajn informojn por la okcidentaj gazetaro kaj sociaj retoj.

forvendita. En la komenco por la e-rezidejo kandidatiĝis homoj precipe el Finnlando, Ruslando, Latvio, Usono kaj Britio. Al la plej konataj e-rezidantoj apartenas ekzemple Ŝinco Abe, la oficanta ĉefministro de Japanio. Kotka estimas, ke ĝis 2025 ekzistos ĉirkaŭ dek milionoj da tiaj e-rezidantoj.

Sekureco, armeo kaj polico

La 24an de februaro 2018, okaze de la nacia festotago, la estona ***ĉefministro Jüri Ratas*** diris, ke Estonio povas senti sin sekura, malgraŭ iaj defioj kiel malstabilecoj, danĝeroj kaj teroro, kiuj ekzistas kaj ne malaperos el la mondo. Sed la estro de la estona registaro trankviligis la civitanojn per la certigo, ke la ŝtato investis multajn rimedojn en la sekurecon de la lando, en kunlaboro kun EU kaj NATO, koncerne la defendon de la lando, kiu pro sia geografia limsituo estas elmetata al apartaj danĝeroj. Estonio havas malgrandan armeon kun 25´000 anoj, de kiuj 4000 troviĝas en la aktiva servo.[51] Trupoj de NATO estis lokitaj en la Baltaj Ŝtatoj kaj Pollando por defendi tiujn landojn en kazo de atako el oriento. La NATO-trupoj en Estonio estas gvidataj de Britio. En januaro taĉmento de italaj militaviadiloj anstataŭis belgan taĉmenton sur la armea aviadila bazejo de Ämari, kiu situas inter Tallinn kaj Paldiski. La kontrolado de la aerspaco de la Baltaj Ŝtatoj okazas en Estonio kaj Litovio. En la pasintaj monatoj tiu aerspaco ofte estis malrespektata de rusaj aviadiloj, kio estas konsiderata de tiuj landoj kiel neakceptebla provoko. Krom tio, danaj kaj estonaj soldatoj trejnadas kune en bazejo ĉe Tapa. Temas pri ekzercoj per aviadiloj kaj tankoj. Per la financa subteno de EU Estonio akiris naŭ ekzemplerojn de ELIX-XL-telestiraviadiloj,[52] kiuj estas ekipataj per kameraoj, por kontroli la aktualan situacion ĉe la orienta limo de Estonio, kiu samtempe formas la orientan limon de EU kaj NATO.

En 2010 fondiĝis nova polica kaj limprotekta oficejo, kiu estas submetata al la Estona Ministerio de la Internaj Aferoj kun la sidejo en Tallinn. Ĉi tiu oficejo kunigas taskojn de la polico kaj de la limprotekto. La konkretaj taskoj estas: konservado de la publikaj sekureco kaj ordo, persekutado de krimoj, protektado de la ŝtataj limoj, eldonado de oficialaj dokumentoj. Krom tio, la oficejo kunlaboras kun la estona armeo laŭ bezono. Nuntempe laboras pli ol 5000 dungitoj en tiu oficejo, kiu estas unu el la plej grandaj estonaj aŭtoritatoj kaj kiu estas gvidata de Elmar Vaher.[53]

POLITIKO

Estonio, kies politika sistemo baziĝas sur la Estonia Konstitucio de la jaro 1992, estas parlamenta demokratio kun prezidento elektita por kvin jaroj. La prezidento havas nur limigitan politikan kompetencon kaj ĉefe reprezentajn funkciojn. De 2006 ĝis 2016 prezidento de Estonio estis Toomas Hendrik Ilves.[54] En oktobro 2016 la parlamento elektis sinjorinon ***Kersti Kaljulaid*** kiel prezidenton de Estonio, ĉefe por eviti aliajn pli signifajn kandidatojn.[55]

La ***nacia parlamento***, kiu nomiĝas en la estona lingvo „Riigikogu“, konsistas el unu ĉambro kun 101 deputitoj.[56] Ĝi estas elektita ĉiujn kvar jarojn en la unua dimanĉo de marto fare de la estonaj civitanoj kiuj plenumis la 18an jaraĝon en tiu tago. En Estonio oni voĉdonas en kabinoj aŭ per la interreto. Ĉe la balotoj per la interreto la elektantoj povas ŝanĝi sian decidon ĝis la antaŭelekta limdato. En la tago de la baloto la decido povas esti ŝanĝita en la interreto por la plej lasta fojo. Post la elekto de la parlamento la deputitoj elektas la ĉefministron de la registaro de Estonio.[57]

[51] Pli da detaloj pri la estona armeo vd. sub https://de.wikipedia.org/wiki/Estnische_Verteidigungsstreitkräfte.
[52] Vd. https://eo.wikipedia.org/wiki/Telestiraviadilo.
[53] Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Polizei-_und_Grenzschutzamt.
[54] Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Toomas_Hendrik_Ilves.
[55] Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Kersti_Kaljulaid.
[56] Vd. https://www.riigikogu.ee.
[57] Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Riigikogu, https://www.riigikogu.ee.

La parlamentaj elektoj de la 1a de marto 2015, en kiuj partoprenis 64% de la voĉdonrajtaj civitanoj, donis jenan rezulton por la politikaj partioj:

- Estona Reformpartio 30 mandatoj
- Estona Centra Partio 27 mandatoj
- Socialdemokratoj 15 mandatoj
- Unuiĝo de Pro Patria kaj Res Publica 14 mandatoj
- Estona Libera Partio 8 mandatoj
- Estona Konservativa Popolpartio 7 mandatoj[58]

Post tio formiĝis en marto 2015 koalicia registaro konsistanta el la Estona Reformpartio, Socialdemokratoj kaj la Unuiĝo de Pro Patria kaj Res Publica. Ĉefministro restis ***Taavi Rõivas***[59] de la Reformpartio, kiu oficis de marto 2014, post kiam ĉefministro ***Andrus Ansip***[60] demisiis por fariĝi EU-komisaro). La 9an de novembro 2016 la registaro rompiĝis post sukcesa esprimo de la malfido kontraŭ Rõivas flanke de la koaliciaj partneroj kaj de la tri opoziciaj frakcioj. Rõivas ne devis abdiki, ĉar li estis malbona ĉefministro. Male, li estis eĉ konsiderata kiel sukcesa juna politikisto.[61] Lia falo okazis ĉefe pro interpartiaj intrigoj kaj precipe pro la ŝanĝoj en la Centra Partio, kie la longjara (kaj malsana) partiestro ***Edgar Savisaar*** (kiu estis konsiderata kiel tro por-rusa politikisto)[62] estis anstataŭigita per ***Jüri Ratas***.[63] La elŝanĝo de Savissar kaŭzis, ke la koaliciaj partneroj de la partio de Rõivas moviĝis kaj postulis lian demision. Post kiam ĉiuj aliaj partioj ĉiam rifuzis kunlabori kun Savisaar, la vojo nun fariĝis libera por alianceco kun la nova partiestro Jüri Ratas. La 23an de novembro 2016 do ekoficis nova koalicia registaro sub la ĉefministro Jüri Ratas de la Estona Centra Partio. Unuafoje, la liberalisma ***Estona Reformpartio***, kiu sukcese regadis la landon dum 17 jaroj,[64] perdis la povon kaj eĉ ne plu estis reprezentata en la nova registaro de Ratas, kiu ĝis nun mirinde tenis la tradicie fragilan registaran konstelacion de Estonio.[65] La venontaj parlamentaj elektoj okazos en marto 2019.

Politikaj partioj

Pro la multnombreco, oftaj apero kaj malapero de partioj kaj ofta ŝanĝado de la nomoj en Estonio aperis malgranda ĝangalo de politikaj partioj. Por eksteraj observantoj estas nefacile klare distingi la profilojn kaj programojn de la unuopaj estonaj politikaj partioj. Ili kutime estas aŭ liberalismaj aŭ konservativaj, aŭ dekstraj aŭ maldekstraj, aŭ montras kombinon inter la diversaj ideologiaj tendencoj. Iuj elementoj de la partioj estas konsideratajkiel „popolismaj“ por gajni la apogon de la (relative malmultaj) elektantoj. Inter tiuj partioj do ne ekzistas tro grandaj ideologiaj abismoj, sed ja ekzistas sufiĉe akra rivaleco inter diversaj partiaj gvdantoj kaj sociaj grupoj, kiuj esprimiĝas en tiuj partioj, kio faras ilian vivon iom malfacila. Ŝajnas, ke ĉiuj partioj estas por-eŭropaj, kvankam la ***Centra Partio*** zorgas ankaŭ pri la bezonoj de la rusa komunumo en Estonio, tamen sen oficiale reprezenti iliajn interesojn.[66]

La ***Estona Konservativa Popolpartio*** direktas sian fokuson ĉefe favore al la interesoj de la estona etno.[67] Kune kun ĝi ankaŭ la ***Estona Libera Partio***[68] estas reprezentata en la estona parlamento de 2015. La danĝero, ke la politika situacio en Estonio povus ŝanĝiĝi kiel en Pollando aŭ Hungario, nuntempe ne ekzistas.

La partio ***Patruja Unuiĝo*** (Isamaa) estis konservema partio, kies protagonisto nomiĝis *Mart Laar*, kiu en la 90aj jaroj ludis la rolon de ĉefministro de Estonio. La plej lasta partiestro Tõnis Lukas,

[58] Vd. https://en.wikipedia.org/wiki/List_of_political_parties_in_Estonia kaj https://de.wikipedia.org/wiki/Parlamentswahl_in_Estland_2015.
[59] Vd. https://en.wikipedia.org/wiki/Taavi_Rõivas
[60] Vd. https://eo.wikipedia.org/wiki/Andrus_Ansip.
[61] Vd. http://www.baltikum-blatt.eu/estland/2378-estland-misstrauensvotum-gegen-premierminister-verlangt.
[62] Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Edgar_Savisaar.
[63] Vd. https://en.wikipedia.org/wiki/Jüri_Ratas.
[64] Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Estnische_Reformpartei.
[65] Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Estland#Koalitionen_ab_1992.
[66] Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Estnische_Zentrumspartei.
[67] Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Eesti_Konservatiivne_Rahvaerakond.
[68] Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Eesti_Vabaerakond.

kiu transprenis la oficon en 2005, gvidis la partion[69] ĝis ĝia kunfandiĝo kun la partio ***Res Publica*** de la iama ĉefministro *Juhan Parts*.[70] El tiu kunfandiĝo estiĝis en 2006 la nova partio ***Patrujo kaj Respublika Unuiĝo*** (Isamaa ja Res Publica Liit“).[71] Ĉi tiu nomo estis konservata ĝis la 2a de junio 2018, kiam la partio ŝanĝis sian nomon al Patrujo (Pro Patria / Isamaa).

La ***Socialdemokratia Partio*** de Estonio, fondita en 1990, estis gvidata de pluraj famaj estonaj politikistoj kiel Marju Laristin, Eiki Nestor, Andreas Tarand kaj Toomas Hendrik Ilves. De 2015 ĝi estas gvidata de Evgenij Ossinovskij.[72]

La iama ***Komunisma Partio*** de Estonio adoptis en 1992 la nomon „Demokratia Laborpartio“ (Tööpartei), fariĝis en 1998 „Socialdemokratia Laborpartio de Estonio“ kaj en 2004 „Estona Maldekstra Partio“, poste ŝanĝis sian nomon al „Unuiĝinta Maldekstra Partio de Estonio“ (EÜVP) kun la provo establiĝi kiel partio de la „demokratia socialismo“. De 2004 ĝi membras en la „Eŭropa Maldekstra Partio“. En la aktuala politiko de Estonio ĝi praktike ludas neniun rolon, ricevinte nur 0,1 procentojn okaze de la parlamentaj elektoj de 2015, kio signifas 764 voĉojn.[73]

Marĝenan rolon ludas ankaŭ la ***Verda Partio*** (5193 voĉoj),[74] la ***Partio de la Popola Unueco*** (2289 voĉoj)[75] kaj la ***Estona Sendependec-Partio*** (1047 voĉoj).[76]

Komence de la 90aj jaroj en Estonio estiĝis kelkaj politikaj partioj, kiuj celis agi laŭ la interesoj de la ruslingvanoj en Estonio. Sed tiuj partioj ludis nur marĝenan kaj efemeran rolon, ĉar ili ne sukcesis mobilizi la plimulton de la rusoj kaj ne sukcesis pli larĝe eniri la parlamentan vivon. La sola partio, kiu sukcesis eniri ĝin en 1995, estis la „Rusa Partio en Estonio“, sed ĝi fiaskis pro la 5%-a limo en la balotoj de la jaro 2003 kaj elfalis el la parlamento. En 2012 ĝi kunfandiĝis kun la „Socialdemokratia Partio de Estonio“. La plej grandan apogon de rusoj inter la politikaj partioj de Estonio ricevas kutime la „Centra Partio“ („Keskerakond“), kiu pli frue estis gvidata de Edgar Savisaar kaj nunteme (2018) provizas la ĉefministron (Jüri Ratas), kvankam ĝi ne povas esti konsiderata kiel ´partio de la rusoj´, kvankam kontraŭuloj de tiu partio asertis tion.

La estona parlamento estas prezidata de la socialdemkrato ***Eiki Nestor***.[77] Liaj anstataŭantoj estas *Enn Eesmaa* (Centra Partio) kaj *Kalle Laanet* (Reformpartio).

Estonio havas jenajn ministeriojn: klerigo kaj scienco, justico, defendo, naturmedio, kulturo, ekonomio kaj komunikado, agrikultura vivo, financoj, internaj aferoj, sociaj aferoj, ekster(land)aj aferoj.[78]

La sidejo de la parlamento (Riigikogu), troviĝas en la malnova kastelo sur la monteto „Toompea“, kaj la rezidejo de la registaro (valitsus) troviĝas en la „Domo Stenbock“ (Toompea)[79] dum la rezidejo de la prezidento (presidendi kantselei) troviĝas en la kastelo de „Kadriorg“ aliflanke de la urbo.[80]

Koncerne la politikan kulturon, la sinteno de la estonoj rilate al la politiko estas intime ligita kun iliaj historiaj spertoj. Necesas konstati, ke la estonoj faras principan diferencon inter la institucia politiko, kiu koncernas la ŝtate regatan politikon kadre de la parlamento, registaro kaj politikaj partioj, kaj la politiko de la (nacia) identeco, kiu havas prioritaton en la konscio de la estona popolo. Al la ĉi-lasta sfero apartenas demandoj kiel la formiĝo de la nacio, ĝia signifo inter aliaj popoloj, la ŝtataneco kaj la kultura identeco. Al la estonoj mankas la rimedoj por fari bazan politikon (kiel ekzemple en Svislando kun ĝia rekta demokratio). Tamen, ĝi povus esti grava ilo por povi influi la formadon de la

[69] Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Isamaaliit.
[70] Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Res_Publica_(Partei).
[71] Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Isamaa.
[72] Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Sotsiaaldemokraatlik_Erakond.
[73] Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Kommunistische_Partei_Estlands.
[74] Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Eestimaa_Rohelised.
[75] Vd. https://et.wikipedia.org/wiki/Rahva_Ühtsuse_Erakond kaj http://rue.ee/WP.
[76] Vd. https://en.wikipedia.org/wiki/Estonian_Independence_Party.
[77] Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Eiki_Nestor.
[78] Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Estnische_Regierung.
[79] Vd. https://www.valitsus.ee/en.
[80] Vd. https://www.kadriorg.ee.

„civitana socio“. En 2002 nur la duono de la demanditoj esprimis sian fidon al la registaro, ĉefministro kaj parlamento. La fido al la politikaj partioj,[81] estis eĉ pli malgranda. La plej malalta grado de la fido rilate al tiuj institucioj estis esprimita de malkleruloj, kamparanoj kaj rusoj. Multaj homoj en la Baltaj Ŝtatoj kredas, ke iliaj politikistoj utiligas siajn oficojn kaj postenojn por persone profiti. Sed la estona institucia politiko estas pli bona ol ĝia reputacio. Malgraŭ ofta malstabileco de la registaro kaj malgraŭ malstabiligaj intrigoj kaj personaj skandaloj inter kaj ene de la unuopaj politikaj partioj, kiuj aspektas kiel ludiloj de unuopaj politikistoj, eblas tamen observi sufiĉe stabilan kontinuecon de la registara laboro, kiu, per politiko ĉiam dekstre de la mezo esence kontribuis al la sukceso de Estonio kiel moderna ŝtato kaj prospera popolekonomio, kun ĉiuj plusoj kaj minusoj de la demokratia kaj kapitalisma ordoj.[82] Almenaŭ la liberaluloj vidas la aferojn tiel.

Se do oni volas eviti, ke la politiko en Estonio degeneros al nura ludilo de iuj sociaj kaj profesiaj retoj, koterioj kaj klientaroj, kiuj povus (mis)uzi ĝin por siaj privataj, personaj kaj profesiaj interesoj, necesus pli forte evoluigi publikajn ilojn de bazdemokratiaj formoj, kiujn la civitanoj povus aktive apliki kaj efike utiligi por eviti aŭ kontraŭstari tian politikan evoluon. Por ke la demokratio ne kadukiĝu al formala fasado, kiu povus perdi sian kredindecon ĉe la amasoj, la estonoj estus bone konsilataj formeti siajn tradiciajn skeptikon kaj indiferentecon rilate al la institucia politiko. Demokratio estas komplika kaj laciga sistemo, por kiu necesas labori ĉiutage per ĉiam novaj engaĝiĝo kaj entuziasmo. Alia problemo estas la rilato inter demokratio kaj kapitalismo, kiu, kiel konate, neglektas aferojn, kiujn ne estas finance profitdonaj kaj eĉ povas kontraŭdiri la spiriton de la demokratio. Ĉu do la demokratio suferas sub la kapitalismo, tia demando estus ankoraŭ pli profunde esplorenda.

Rilatoj kun Eŭropa Unio

La 14an de septembro 2003 la estonoj voĉdonis por aliĝo de sia lando al la Eŭropa Unio (EU) per 66,9% poraj kaj 33,1% kontraŭaj voĉoj. La kvoto de la partopreno estis 64 procentoj. Tio estis, iom kurioze, la plej malalta procentaĵo en EU-aliĝbaloto en orienta Eŭropo. Ĉu multaj rusoj voĉdonis kontraŭ la aliĝo? La 1an de julio 2017 Estonio transprenis la prezidon de EU por la unua fojo. Ĝi okazis duonjaron pli frue, ĉar Britio decidis forlasi la Union.

Rilatoj kun Usono

Certe, la elekto de Donald Trump kiel nova prezidento de Usono surprizis, ŝokis kaj konfuzis ankaŭ la homojn kaj politikistojn en la Baltaj Ŝtatoj, kvankam oni malvolonte parolas pri tio publike aŭ oficiale, ĉar oni dependas de la bonvolo de Usono kaj de NATO, kiuj devas defendi la Baltajn Ŝtatojn. Por konservi la tradicie bonajn rilatojn kun Ameriko, en Tallinn oni klopodas ankaŭ teni favorajn rilatojn kun tiel kontestata figuro kiel Trump, kiu estas suspektata pri (iamaj) intimaj rektaj aŭ malrektaj ligoj kun la rusa (sovetia) mafio[83] kaj kiu estas konata kiel la „preferata kandidato de la Kremlo“, en kies senco li celas ŝanĝi kaj detrui la okcidentan mondordon. En la Baltaj Ŝtatoj kaj precipe en Estonio oni volonte memoras la viziton de Barack Obama de antaŭ kelkaj jaroj, kiam li faris al tiuj landoj diversajn promesojn, laŭdojn kaj komplezojn, kiuj devis trankviligi la homojn en Baltio vide al la danĝeroj kaj minacoj flanke de Ruslando, kiujn ili ege timas.[84]

En aprilo 2017 la prezidentoj de la tri Baltaj Ŝtatoj vizitis prezidenton Donald Trump en la Blanka Domo en Vaŝingtono, kie okazis oficiala renkontiĝo inter Kersti Kaljulaid (Estonio), Raimonds Vējonis (Latvio) kaj Dalia Grybauskaitė (Litovio). En la okcidenta gazetaro tiu evento trovis malgrandan

[81] Vd. https://rus.postimees.ee/6401870/nestor-u-estonskih-partiy-problemy-s-reputaciey. Laŭ tiu ĉi artikolo, parlamentestro Nestor diris, ke „la reputacio de la partioj estas pli malalta ol dezirate“.
[82] Vd. la kontriubuaĵon pri Estonio en: Wolfgang Ismayr, W. (eld.): Die politischen Systeme Osteuropas. 2004.
[83] Vd. la ĉi-rilatan libron de Craig Unger, kiu aperis en 2018. Laŭ ĉi tiu libro, en la 80aj jaroj unue anoj proksimaj al la rusa mafio vizitis la Trump-turon en Novjorko por aĉeti loĝejojn, kaj poste la sovetiaj KGB kaj diplomatio interesiĝis pri la riĉega grandkomercisto Trump (kiu havis ĉeĥan edzinon, kiu estis observata de la ĉeĥoslovaka sekretservo) kiel taŭga „celobjekto“ por „kunlaboro“ kaj invitis lin al Moskvo. Ankaŭ politike Trump estis por la Kremlo interesa homo, ĉar li pledis por nuklea malarmado kaj kritikis la okcidentan aliancon.
[84] Lian paroladon de la 3a de septembro 2014 en Tallinn vd. sub https://www.youtube.com/watch?v=T0cfkVlFgqU.

atenton, sed ĝi estis grava kaj signifa por la baltoj, ĉar post la prezido de Obama, kiu garantiis al la Baltaj Ŝtatoj centprocentan sekurecon kadre de NATO, Trump estigis kelkajn dubojn. La renkontiĝo estis pozitive konkludita per gazetara konferenco, dum kiu Trump gratulis al la Baltaj Ŝtatoj okaze de ties 100-jara jubileo de la ŝtata sendependeco kaj esprimis la esperon, ke la longaj kaj bonaj rilatoj inter Usono kaj la Baltaj Ŝtatoj daŭros ankoraŭ la venontajn cent jarojn. Trump emfazis, ke Usono ĉiam subtenis la suverenecon de la Baltaj Ŝtatoj kaj neniam agnoskis la sovetian okupacion. Trump laŭdis la Baltajn Ŝtatojn pro tio, ke ili pagas por la defendo kaj armado 2 procentojn de la malneta nacia produkto, kaj ĝojis, ke ili estas bonaj aliancanoj, kiuj plenumas siajn devojn. Li ankaŭ montris sin kontenta, ke la Baltaj Ŝtatoj partoprenas en la koalicio kontraŭ la Islama Ŝtato. Novajn perspektivojn de la kunlaboro kun Usono li vidis sur la kampoj de la scienco, teknologio kaj medicino. Trump dankis ankaŭ la baltajn prezidentojn kaj certigis, ke Usono montriĝos lojala kaj forta amiko de la Baltaj Ŝtatoj ankaŭ en estonto. En uson-balta deklaraĵo li promesis, ke li regule sendos usonajn soldatojn en la Baltajn Ŝtatojn, kiuj fortigu la sekurecon de la aerspaco. La nomita deklaraĵo konfirmis ankaŭ la engaĝiĝon laŭ artikolo 5 de la Vaŝingtona Konvencio, en kiu la fundamentaj principoj de la kolektiva defendo estas fiksitaj. Tiel, la causa baltica estis savita, pri kio verŝajne eĉ Putin estis mirigita.

Rilatoj kun Ruslando

Depost la sendependiĝo de Estonio en 1991 Ruslando observas kun malŝato kaj ĉagreno, kiel la iama sovetia respubliko trovis sian integriĝon en la okcidenta mondo. Al Moskvo precipe malplaĉis la aliĝo de Estonio (kaj de Latvio kaj Litovio) al NATO en 2004. Aliaj kaŭzoj por kvereli estis/as precipe la 294 kilometrojn longa rus-estona limo kaj la relative granda ruslingva minoritato en Estonio.

Tial, la politikaj rilatoj de Estonio kun Ruslando estas nek bonaj sed malbonaj sed malvarmaj, kvankam la trafikaj kaj komunikaj rilatoj inter ambaŭ landoj ne estas interrompataj. Tiel klarigis la situacion *Hanno Pevkur*, iama ministro (2009-16), vicprezidinto de la Estona Parlamento (ĝis marto 2018) kaj estro de la Reformpartio (ĝis januaro 2018). Tiu stato restos tiel longe kiel Ruslando ne pretas respekti internaciajn regulojn kaj apliki konvenciojn.[85] La glacian staton la politikistoj klopodas diplomatie maldramigi, kvankam Estonio nature plene subtenas la sankciojn de EU kontraŭ Ruslando.

Aliaj pli malnovaj temoj por disputi kun Ruslando koncernas la sovetian historian pasintecon, la cirkonstancojn de la „aliĝo“ de Estonio al USSR en la jaroj 1940 kaj 1944, kiu estas konsiderata en Estonio kiel anekso, la tiaman apartenon de Estonio al Sovetunio, kiun la estonoj nomas okupacio,[86] kvankam la rusoj ne uzas ĉi tiun terminon, kaj la interpreton de la internacijura statuso, kiu estis ligita kun la aparteno de Estonio al Sovetunio. Kiel konate, la okcidentaj landoj neniam agnoskis la fakton, ke Estonio estis parto de Sovetunio post la dua mondmilito.[87]

En 2005 ambaŭ landoj klopodis solvi la problemon de la komuna limo per determinado de la ekzakta linio de la koncernataj teritorioj per traktato. La 18an de majo 2005 en Moskvo estis subskribita la limkontrakto, pri kiu oni diskutis de 1999. Sed kelkajn semajnojn poste la rusa flanko retiris la subskribon, ĉar ĝi ne konsentis pri la preamblo, kiun la estonoj volis aldoni por atentigi pri la „longa okupacio“ de Estonio kaj „la agresoj de Sovetunio kontraŭ Estonio“, kiuj inkludas inter alie la perfortan rusigon (aŭ sovetiigon) de la lando kaj la deportadon de estonaj civitanoj en la internon de Sovetunio, pro kio Ruslando neniam pardonpetis aŭ senkulpiĝis. La rusia prezidento Vladimir Putin, kiu mem tre malŝatas la Baltajn Ŝtatojn, kiujn li oficiale neniam vizitis, prokrastis subskribi ĝin, ĉar li rifuzis akcepti la vidpunkton de la estona flanko koncerne la anekson de Estonio en 1940 kaj rilate la Traktaton de Dorpat de 1920. Finfine, la limkontrakto estis subskribita kaj ratifita en 2011 de ambaŭ ŝtatoj.[88]

[85] Vd. https://www.youtube.com/watch?v=tFiMoqNZIeE
[86] Dum kiu la rusoj en la baltaj kaj aliaj sovetiaj respublikoj kondutis kiel „Herrenmenschen“, kio estu ĉi-loke klare dirita.
[87] Tiun temon plej kompetente traktis Boris Meissner (1915-2003) en: Die baltischen Nationen, Estland, Lettland, Litauen. Köln 1991.
[88] Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Grenze_zwischen_Estland_und_Russland.

Nuntempe funkcias 28 marlimaj kontrolpunktoj, 2 strataj limpunktoj, 2 fervojliniaj limpunktoj kaj 2 specialaj limpunktoj, kiuj estas uzeblaj nur por civitanoj de Estonio kaj Rusio. Krom tio ekzistas 6 pliaj limpunktoj, kiuj ekfunkcius en la kazo, se Estonio forlasus la konvencion de Schengen.[89]

La tri ĉefaj strataj (aŭtomobilaj) limpunktoj inter Estonio kaj Ruslando estas tiuj de Narva-Ivangorod (kun paralela internacia trajna linio) al la Leningrada provinco kaj de Koidula-Peĉora (Kuniĉina Gora) kaj Luhamaa-Ŝumilkino al la Pskova provinco. Krom tio ekzistas limpunkto por piedirantoj ĉe Saatse-Krupp ĉe la Pskova Lago por atingi la apudajn rusajn vilaĝojn.[90] Kuriozaĵo en tiu apudlima angulo de Estonio estas, ke oni tuŝas kelkcentmetrojn longan rusan teritorion, se oni veturas de Värska al Saatse. Halti en tiu zono estas strikte malpermesate.[91]

La alia konflikto koncernas la ruslingvan minoritaton en Estonio, kie vivas ĉirkaŭ 330´000 rusoj aŭ rusdevenaj homoj, formante unu kvaronon de la 1,32 miliona loĝantaro. Grandparto de tiuj rusoj vivas en la orienta parto ĉirkaŭ Narva en la provinco Ida-Virumaa, en la urbo Paldiski kaj en la ĉefurbo Tallinn. De 85´000 loĝantoj de Narva nur ĉirkaŭ 6000 personoj posedas estonan pasporton. Moskvo konsideras sin advokato de tiuj rusoj kaj riproĉas al Estonio, ke ĉirkaŭ cent mil „civitanoj“ estas sen civitaneco. Laŭ la estona leĝo, civitano de Estonio povas aŭtomate fariĝi nur tiuj homoj, kiuj jam posedis la estonan civitanecon antaŭ 1940. Por akiri la estonan civitanecon aŭ ŝtatanecon oni devas sukcese trapasi ekzamenon, kiu testas la konojn de la estona lingvo kaj de la konstitucio. Multaj rusoj konsideras tian ekzamenon tro malfacila obstaklo, kvankam la estonaj aŭtoritatoj argumentas, ke per iom da fortostreĉo kaj motivacio eblas sukcese trapasi la postulatan ekzamenon. La problemo estas, ke eĉ post 40-60 jaroj da vivado en Estonio multaj rusoj daŭre ne scipovas la estonan lingvon, kiun ili neniam lernis, ĉar dum la sovetia tempo ili praktike ne bezonis ĝin. Alia kondiĉo por la sukcesa trapaso de la ekzameno kaj la ricevo de la estona civitaneco estas, ke la kandidato devas konfesi deklaron pri lojaleco rilate al la estona ŝtato.

Monumentaj konfliktoj

En 2007 Estonio travivis ondon de protestoj, kiuj estis lanĉitaj de ruslingvaj junuloj. La kaŭzo por tiuj tumultoj estis la translokado de la „bronza soldato“ de Tallinn kune kun la restaĵoj de sovetiaj soldatoj, kiuj pereis en la Dua Mondmilito, laŭ ordono de la estonaj aŭtoritatoj de la urbocentro al armea tombejo rande de la urbo. Ĉi tiun monumenton, kiu estis starigita en 1947, la estonoj konsideras kiel memorilon pri la sovetia okupacio kaj malpli kiel omaĝon al la liberiĝo de la nazigermana reĝimo, al kiu la monumento estas dediĉita. 82% de la estonoj apogis la translokadon de la monumento, dum 84% de rusoj estis kontraŭ. Tiu incidento kaŭzis ne nur tumultojn en la ĉefurbo, kiuj estis disbatitaj de estonaj sekurecaj fortoj kun unu mortinta protestanto, 156 vunditoj, inter ili 29 policistoj, kaj 1160 arestitaj homoj, sed provokis ankaŭ gravan krizon en la diplomatiaj rilatoj de Estonio kun Rusio, ĉar la orienta najbaro malaprobis la translokadon de tiu memorialo. En Moskvo la estona ambasadejo estis „sieĝata“ de furioza hordo dum pluraj tagoj, kiu alvokis bojkoti estonajn varojn, kaj kiberatakoj estis lanĉitaj kontraŭ la estona registaro. Tiel, Ruslando, kiu evidente ankoraŭ ne rezignis pri sia imperiisma politiko, kutimas enmiksiĝi en la internajn aferojn de Estonio, krude komunikante sian vidpunkton, se al ĝi io ne plaĉas en Estonio.

Novan skandalon kaj novajn tensiojn kun Ruslando provokis la inaŭguro de monumento dediĉita omaĝe al la defendantoj de la estona sendependeco dum la unua (!) mondmilito, kiu estis starigita en 2009 sur la Placo de la libereco en Tallinn. La monumento portas la „Krucon de la libereco“, kiu estis la unua estona ordeno, per kiu homoj estis honorigitaj, kiuj havis apartan meriton dum la milito de 1918-20, en kiu pereis 3588 estonoj. La monumento, kies konstruado estis leĝe antaŭvidita en 1936, ne povis esti realigita pro la sovetia okupacio. En 2006 okazis konkurso, kiun gajnis Rainer Sternfeld, Andri Lajdre, Kadri Kiho kaj Anto Savi. La monumento estis konstruita de Celander Ehitus OÜ. Kritikantoj de la memorialo admonis, ke ĝi similas al la monumento pri la hitleraj okupantoj, kiu estis starigita en 1944 sur la monteto Maarjamägi en Pirita. Kritikon trovis precipe la blazona simbolo, kiu

[89] Vd. https://en.wikipedia.org/wiki/Police_and_Border_Guard_Board.
[90] Vd. https://www.ost-impuls.de/archives/293-Russische-Grenzuebergaenge.html.
[91] Vd. https://et.wikipedia.org/wiki/Saatse_saabas.

troviĝas en la meza rondo de la kruco kaj kiu similas la simbolon, kiun uzis la 20a estona divizio de Waffen-SS.[92] Tiel, anstataŭ kun la unua monmilito multaj homoj false ligas la monumenton kun la dua mondmilito. Sed tio ne estas ĉio. Kiam oni konstruis la fundamenton de la memorialo estis trovitaj la restaĵoj de du nekonataj soldatoj de la Ruĝa Armeo. La peto de la Antifaŝisma Komitato de Estonio identigi la restaĵojn estis ignorata.[93]

La plej freŝa ekzemplo de rusia enmiksiĝo en la internajn aferojn de Estonio ilustras la kazo de la estona urbo Lihula, kie komence de septembro 2018 estis starigita kopio de memorŝtono honore al forpasintaj estonaj veteranoj de Waffen-SS. La starigon de la monumento, kiu okazis nur dum kelkaj horoj, organizis la Estona Konservativa Popolpartio. La ŝtono montris soldaton kun pafilo kaj vestitan en germana uniformo el la dua mondmilto kaj enhavis la surskribon „Por la estonaj viroj, kiuj batalis en 1940-45 kontraŭ la bolŝevismo kaj por la restarigo de la sendependeco de Estonio“. Rusio kritikis la starigon de tiu memorŝtono, en kiu ĝi vidis gloradon de la nazisocialismo. Antaŭ 14 jaroj, la originalo de ĉi tiu monumento estis forigita laŭ ordono de la estona registaro, post kiam ĝi estis inaŭgurita en tiu loko. De tiam ĝi konserviĝas en la milita muzeo en Lagedi ĉe Tallinn. Anoj de tiu dekstrema partio, kiu estas reprezentata en la estona parlamento per sep deputitoj, intencas remeti ĝin venontjare denove en Lihula.

Jam antaŭe, la inaŭguro de private lanĉitaj monumentoj honore al iuj estonaj anoj de Waffen-SS kaŭzis proteston. Precipe la rusia ambasado en Tallinn komunikis, ke ĝi vidas en la glorado de estonaj anoj de Waffen-SS dimension de kulto.[94]

Ĉi tiuj ekzemploj montras, ke tiaj incidentoj povas rapide ekboli kiel interetnaj kaj interŝtataj konfliktoj kaj alpreni internacian politikan dimension. Ĉar en tiaj kazoj Ruslando tuj profitas ĵeti oleon en la fajron, tiaj konfliktoj povas fariĝi tre danĝeraj, kiel montris la situacioj en Ukrainio aŭ Kartvelio.

Por premi Estonion Ruslando aplikas la rimedon de neoficialaj sankcioj, kiuj konsistas ekzemple en tio, ke Moskvo, kiu senskrupule utiligas la ekonomion kiel armilon, sendas malpli da varoj tra la havenoj de Estonio. Estonio plene dependas de energio el Ruslando, sed por fariĝi sendependa de ĝi, Estonio daŭre ekspluatas sian naftoardezon, kiu estas aparte malbona por la naturo. EU devigas Estonion pli kaj pli rezigni pri tiu ardezo favore al novaj energioj. Kun Ruslando la estonoj kverelas ankaŭ rilate la novan gastubon „Nord Stream II“, kiun Estonio volas eviti.

Ankaŭ kiam en 2011 Estonio enkondukis la eŭromonon kiel unua postsovetia ŝtato, Moskvo reagis negative, ĉar rusiaj gazetoj malkovris novan „provokon“. Nome, la dorsa flanko de la moneroj montras la profilon de la teritorio de Estonio, kiu laŭdire ankaŭ inkludas rusian teritorion (kvankam tio estas tre malfacile konstatebla kaj pruvebla).

En septembro 2014 nova ĉelima incidento vekis internacian atenton kaj denove ŝarĝis la rilatojn inter Tallinn kaj Moskvo, kiam *Eston Kohver*, oficisto de la estona defenda polico, estis kaptita de rusiaj soldatoj, arestita kaj kondamnita al 15-jara arestpuno pro laŭdira spionado sur rusia teritorio. Li estis retenita en Ruslando dum pli ol unu jaro kiel ostaĝo, antaŭ ol en septembro 2015 li povis reveni al Estonio kadre de interŝanĝo de agentoj.[95]

En novembro 2017 Estonion vizitis Miĥail Ŝvydkoj, speciala komisiito de la rusia prezidento Vladimir Putin. Ŝvydkoj diris, ke li ĝojus, se la estonoj invitus la rusan flankon por partopreni la festan ceremonion okaze de la 100-jariĝo de Estonio en 2018. Li konfirmis, ke la rusoj ĝis nun ankoraŭ ne ricevis tian inviton. Dum tiu vizito la rusa komisiito renkontis en Tallinn la estonan ministron pri kulturo, Indrek Saar, la ministron pri klerigo kaj scienco, Mailis Reps, kaj la vicurbestron de Tallinn, Mihhail Kõlvart. Kio poste okazis kun tiu invitpeto ne estas konate al mi.

[92] Vd. https://en.wikipedia.org/wiki/War_of_Independence_Victory_Column kaj https://en.wikipedia.org/wiki/20th_Waffen_Grenadier_Division_of_the_SS_(1st_Estonian). En 2012 la estona parlamento akceptis rezolucion, en kiu oni asertis, ke la membroj de la 20a estona divizio de Waffen-SS estis batalantoj por la libereco de Estonio. (Vd. Rolf Michaelis: Esten in der Waffen-SS. Widnau 2010).
[93] Vd. https://en.wikipedia.org/wiki/War_of_Independence_Victory_Column (rusan version).
[94] Vd. https://www.nau.ch/russland-wirft-estland-nationalsozialismus-vor-65410629.
[95] Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Grenze_zwischen_Estland_und_Russland.

Anstataŭ Putin aŭ alia altranga politikisto de Ruslando Estonion vizitis papo Francisko en septembro 2018 okaze de sia vojaĝo tra la Baltaj Ŝtatoj.[96] Lia akcepto fare de la kredantoj kaj oficialaj reprezentantoj ĉie en la lando de Mario estis ege varma, entuziasma kaj karakterizata de reciproka simpatio, eĉ en la protestantaj Latvio kaj Estonio, kaj memorigis la tempojn de la pola papo Johano Paŭlo IIa, kiu vizitis la baltajn landojn en 1993. La katolika diservo okazis sur la Placo de la libereco en Tallinn antaŭ la memorialo de defendantoj de la estona sendependeco dum la unua mondmilito kaj estis akompanata de belega muziko, kio estas kutima en Estonio.[97] La papo parolis pri „sankta estona popolo“, samtempe bedaŭrante, ke ekzistas tiel malmultaj kredantoj en tiu lutera lando. Laŭ oficialaj kalkuloj en Estonio ekzistas nur ĉirkaŭ 6000 katolikoj, do temas pri klasika diasporo, kiu tamen posedas katolikan episkopon (kiu estas franco de vaska deveno), kelkajn katolikajn pastrojn kaj monaĥejojn, inter kiuj tiuj de la fratinoj de Patrino Tereza kaj de la Brigittaninoj en Pirita[98] estas la plej famaj.[99]

La Sekreta Servo de Estonio admonas pri danĝeroj kaj minacoj flanke de Ruslando

La spertoj faritaj kun Ruslando sub la agresema gvido de Vladimir Putin en Kartvelio, Ukrainio kaj Sirio kaj antaŭe en Ĉeĉenio, kie la militoj de la rusoj kontraŭ tiuj landoj estis kondukitaj per eksterodinaraj krueleco kaj fieco, igas supozi la estonojn kaj la aliajn baltianojn, ke en la kazo de Ruslando temas pri ege danĝera, malica kaj brutala potenco, kiu konas neniujn skrupulojn kaj kies politikajn kaj armeajn agadojn, interne kaj ekstere de la lando, necesas atenteme observi por eviti surprizojn de negativaj aktivecoj, kiuj povus esti direktataj ankaŭ kontraŭ Estonio kaj la aliaj landoj de la regiono.

La raporto 2018 de la Estona Eksterlanda Sekretservo, kiu enhavas profundan analizon pri la situacio en Ruslando el la vidpunkto de Estonio, listigis ĉiujn esencajn riskojn kaj danĝerojn, kiuj eliras el Rusio kaj povus minaci Estonion kaj aliajn landojn.

La ĉefa celo de Putin kaj lia bando estas konservi la politikan povon. Por atingi tiun celon tiuj homoj pretas fari ĉion, ne timante skrupulojn. Sed la pli kaj pli malfavora interna situacio de Ruslando donos al tiu kleptokratia elito, kiu akaparis la tutan politikan kaj ekonomian povon en Ruslando, malpli da ebloj por manovri la aferojn laŭ sia deziro. La problemoj, kiujn Ruslando alfrontas, povas malhelpi kaj eĉ haltigi la progreson de la lando, kun fatalaj sekvoj. Kvankam la ciferoj de la popularеco de Putin oficiale estas altaj, oni ne povas vere pritaksi la realan apogon al li, des pli ke la opinio de la popolo povas subite ŝanĝiĝi laŭ aktualaj okazaĵoj. Malgraŭ kreskanta malkontenteco en la popolo kaj malgraŭ la stagnado de la politiko kaj ekonomio, oni devas ankoraŭ sufiĉe longe enkalkuli la ekziston de la Putin-reĝimo, kiu prezentas sin tre forta kaj stabila. Tiu malkontenteco en la popolo, la malfavora situacio en la lando, la falo de la vivnivelo de vastaj tavoloj kaj la ĝenerala korupto, kiuj povas kaŭzi novajn publikajn manifestaciojn kaj protestojn, venontfoje verŝajne kun eĉ pli granda nombro de partoprenantoj, signifas gravan minacon por la reĝimo kaj esencajn riskojn ankaŭ por eksterlando, ĉar ili povas havi senperajn sekvojn por aliaj landoj. La uzado de la interreto kaj ĝia influo en la popolo de Ruslando kreskas, precipe en la urboj kaj inter la junaj generacioj. Pro tio, la timema rusa registaro celas, se ne subpremi kaj malpermesi, sed almenaŭ malhelpi la interreton, ekzemple per laŭbezona blokado de konkretaj paĝoj kaj adresoj. Certe, la registaro strebos fortigi la subpremadon de la opoziciuloj kaj kritikistoj kiel Aleksej Navalnyj. En Ruslando la registaro tradicie malfidas la popolon kaj la popolo malfidas la registaron. Koncerne la okcidentajn sankciojn kontraŭ Ruslando estas malfacile prognozi, al kio ili kondukos, sed ilia celo estas devigi Ruslandon pli forte respekti la internaciajn regulojn, normojn kaj konvenciojn. Bedaŭrinde, la registaro de Ruslando sufiĉe ofte demonstris, ke ĝi ne pretas respekti ilin por kontribui al pli alta grado de la transparenteco kaj fido.

La Sekreta Servo de Estonio kredas, ke Ruslando prezentas danĝeron ne nur por Estonio, sed ankaŭ por Latvio kaj Litovio, tiel longe ke Ruslando minacas tiujn landojn per armeaj rimedoj por atingi proprajn celojn. Tion Ruslando ĉiam denove pruvas pere de armeaj ekzercoj apud la limoj de la Baltaj Ŝtatoj, kiuj klare montras celojn direktitajn kontraŭ tiuj ŝtatoj, ekzemple simuladon de atako. Ruslando

[96] Programon, tekstojn de la paroladoj kaj filmojn vd. sub http://w2.vatican.va/content/francesco/it/travels/2018/outside/documents/papa-francesco-paesi-baltici_2018.html.
[97] Vd. https://www.err.ee/864084/paavsti-missa-toi-vabaduse-valjakule-ule-10-000-inimese.
[98] Vd. https://www.darientimes.com/2017/06/01/convent-of-st-birgitta-celebrates-canonization-and-60-years-in-darien
[99] Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Römisch-katholische_Kirche_in_Estland.

ege timas la scenaron de „kolora revolucio“ laŭ la modelo de Kartvelio aŭ Ukraino sur sia tereno, do ĝi entreprenos ĉion eblan por eviti tian scenaron. Aparta riska zono estas la eksklavo de Kaliningrado, kie troviĝas rusaj raketaj sistemoj, kiuj povas esti ekipitaj per nukleaj armiloj. Ĉu temas nur pri blufo aŭ Ruslando vere pretas „defendi“ sin per nukleaj armiloj, kiel Putin aludis dum la krimea krizo de 2014, estas malfacile diri.

Kune kun la policaj trupoj de OMON kaj SOBR alia grava minaco kontraŭ najbaraj landoj povas esti la novkreita Nacia Gvardio. Neglektoj, korupto, ŝtelado, sendisciplineco, malalta moralo kaj perforto estas gravaj problemoj en la rusa armeo. En kombino kun la ekonomiaj problemoj tiuj fenomenoj prezentas ege danĝeran mikson de riskoj. La militaj aktivecoj en Sirio, kiuj havas la celon demonstri al la mondo la armean potencon de Ruslando, estas altgrade danĝeraj, ĉar ili povus vastigi aŭ akceli la militajn aktivecojn en tiu regiono kaj provoki refortiĝon de la islamisma teroro en formo de venĝo. La celo de la militaj agadoj en Donbaso estas teni la politikan situacion en Ukrainio malstabila por eviti ĝian aliĝon al Eŭropa Unio. Ĝuste tiajn scenarojn kiel en Kartvelio, Moldavio, Ukrainio kaj Sirio la Baltaj Ŝtatoj ege timas en siaj propraj landoj, ĉar Ruslando povus apliki ilin ankaŭ tie.

La ekstera politiko de Ruslando, gvidata de Putin kaj Lavrov, kondutas oportunisme por atingi proprajn celojn per agresema propagando precipe kontraŭ Eŭropo, kiu estas konsiderata kaj misfamigata kiel malamiko aŭ kontraŭulo. Ruslando volas impresi la mondon por ludi propran gravan internacian rolon, kaj por atingi tiun ĉi celon kaj altigi sian influon ĝi ne hezitas laŭplaĉe lanĉi novajn konfliktojn en diversaj landoj kaj regionoj de la mondo laŭ la modelo de Kartvelio (precipe Abĥazio kaj Sudosetio), Ukrainio kaj Krimeo. Por tiu politiko servas aparte bone la najbaraj ekssovetiaj landoj, kie Ruslando klopodas malhelpi kaj bremsi la demokratiigon kaj integradon de tiuj landoj en la eŭropajn kaj okcidentajn strukturojn kaj influi la rusajn minoritatojn en sia senco. En tio Ruslando utiligas la narativon de la kontraŭterorisma batalo por refortigi sian internacian politikan rolon, enmiksiĝante en diversajn landojn kaj malrespektante internaciajn traktatojn kaj konvenciojn (kion cetere parte ankaŭ Usono faris, aK). Antaŭ ĉio Ruslando klopodas eviti la aliĝon de Svedio, Finnlando kaj Ukrainio al NATO, same de la balkanaj landoj, precipe de Serbio (kaj Montenegro, kiu antaŭ nelonge jam fariĝis membro de NATO je la granda malplaĉo de Moskvo). Samtempe, Ruslando estas interesata pri armea kunlaboro kun la landoj de la Persa Golfo, precipe kun Irano kaj Turkio (kiu cetere estas lando de NATO!), kiuj estas regataj de ege agresemaj kaj danĝeraj politikistoj. En la landoj de Centra Azio Ruslando aktive enmiksiĝas per la preteksto, ke ĝi batalas kontraŭ la terorismo (sed en Sirio montriĝis, ke ĝi batalas precipe kontraŭ la malamikoj de Asad kun la celo savi lian ŝtaton).

Alia danĝero menciita en la raporto de la Sekreta Servo de Estonio, kiu prezentas sin por la Okcidento kaj kiu ofte estas forgesata aŭ subtaksata, estas la kutimo de rusaj organoj kolekti ĉiuspecajn informojn de eksterlandanoj, ekzemple diplomatoj, komercistoj, ĵurnalistoj kaj turistoj, kiuj vojaĝas al Ruslando aŭ tie restadas. En tio la rusaj organoj aparte interesiĝas pri diversaj aliroj de tiuj homoj al interesaj informoj (pri politiko, ekonomio kaj armeo) kaj pri la funkcioj, kiujn tiuj homoj havas. Unuan selekton la rusaj organoj povas fari laŭ la informoj, kiujn havigas la vizaj formularoj, kiujn eksterlandanoj devas plenigi per siaj personaj indikoj. Ĉar eksterlandanoj ofte vojaĝas sen familiaj membroj al Ruslando, kie ili loĝas izolite en hoteloj, ili povas aparte facile fariĝi viktimoj de tiaj faroj, kiuj povas etendiĝi ĝis ĉantaĝo. Ankaŭ iliaj telefonoj kaj komputiloj povas esti „inspektataj“. Ofte tiaj eksterlandanoj ne rimarkas, kio okazas en la anticipa fazo de la persona kontaktado fare de sekretaj organoj de Ruslando, kiuj konas ĉiujn trukojn kaj havas neniujn skrupulojn. Tiu metodo estas aparte efika, ĉar ĝi estas malmultekosta kaj por la rusa flanko sendanĝera, ĉar eksterlandaj sekretservoj povas pli malfacile malhelpi homojn, kiuj donas tiajn informojn sur rusia teritorio. La rusaj sekretaj servoj aparte interesiĝas pri homoj, kaj eksterlandanoj kaj rusoj, kiuj havas specialajn sciojn kaj fakajn konojn. En tio internaciaj konferencoj, ankaŭ sciencaj, junularaj festivaloj kaj sportaj konkursoj ludas elstaran rolon. Pri la klasika spionado, kiu estas daŭrigata per ĉiuj rimedoj, ni tute ne parolu. Al tiu kategorio de riskoj kaj danĝeroj apartenas ankaŭ praktikoj, laŭ kiuj (mis)informoj estas disvastigataj tra la gazetaro kaj sociaj medioj de la „malamikaj“ landoj kun la celo diskrediti kaj konfuzi la tieajn homojn, eventuale ŝanĝi ilajn opiniojn pri Ruslando. Krom tio, ekzistas „influaj agentoj“, kiuj estas pagataj kaj preparataj de Ruslando kaj aktivas en la politikaj partioj de aliaj landoj ne nur por ekscii la pozicion kaj opinion de iliaj gvidantoj, sed ankaŭ por influi iliajn decidojn kaj diskrediti la politikistojn, kiuj kritike rilatas al Ruslando. Do, riskoj en la rilatoj kun Ruslando ekzistas multacete sur diversaj kampoj kaj laŭ diversaj

manieroj. Laŭ la armea doktrino de generalo Valerij Gerasimov necesas apliki rimedojn, metodojn kaj praktikojn sur la informa kampo sen diferenci militan kaj pacan tempojn kun la celo subfosi la reziston kaj konfuzi la kontraŭulojn, t.e. NATOn kaj ties membroŝtatojn. Do, temas pri „informa milito“ aŭ „milito de informoj“. Kiel la estona televido raportis, en Sankt-Peterburgo funkcias centro por informa milito de la rusa armeo, kie laboras „informaj militantoj“ ĉiutage inter la 9a kaj 17a horoj. La ĉefa celo de ĉiuj tiuj agadoj estas krei negativan bildon pri la ŝtatoj kaj socioj de la Okcidento. Tio montras, ke Ruslando kapablas gvidi ampleksan „hibridan informmiliton“ kontraŭ la Okcidento. Pri la kiberatakoj fare de rusaj hakeroj kaj diversaj kiberkrimuloj, kiuj praktikas ankaŭ kiberspionadon kaj kunlaboras kun rusiaj sekretservoj (precipe FSO, FSB, SVR kaj GRU) kun la celo influi balotojn en okcidentaj landoj, estis skribite jam supre. Ĉar la Baltaj Ŝtatoj festas la 100-an jubileon de sia sendependeco, kiu pli malpli koincidas kun la memoro pri la rusa revolucio de 1917, Ruslando organizas „sciencajn“ konferencojn por propagandi la historiografiajn vidpunktojn de la Kremlo, kiuj devias de tiuj de la Baltaj Ŝtatoj kaj celas disvastigi „alternativajn faktojn“ pri la historio, en kiu parto de la vero estas prisilentigita.

Finfine, la raporto, kiu povas esti konsiderata ankaŭ kiel publika averto al la homaro, mencias ankaŭ la danĝeron elirantan el Norda Koreio, kiu povus vendi armilojn, produktitajn en Sovetunio kaj Ruslando, precipe nuklean materialon, al teroristoj, kiuj povas minaci la tutan mondon.[100]

SOCIO

Demografiaj problemoj en la Baltaj Landoj

Laŭ iu prognozo de UN, la Baltaj Ŝtatoj ege suferas demografiajn problemojn, kiuj estas tie plej drastaj en eŭropa komparo. Kvankam la vivnivelo en la Baltaj Landoj kreskis, la junaj generacioj amase forlasis la patrujon, ĉar la malfermataj limoj ebligas al la junaj homoj serĉi sian feliĉon en la pli riĉaj okcidenteŭropaj landoj. Inter 1990 kaj 2016 la nombro de etnaj estonoj malkreskis je preskaŭ 60´000 homoj. La suma nombro de la loĝantaro de Estonio malkreskis en tiu periodo je 252´802 personoj, kio estas ŝuldata precipe dank´ al la negativa kvoto de naskiĝoj. Aliflanke, migrantoj el Azio aŭ Afriko ne emas ekloĝi kaj vivi en la Baltaj Landoj, kaj la popoloj en tiuj landoj ankaŭ ne emas bonvenigi ilin. En UN oni opinias, ke la Baltaj Ŝtatoj troviĝas proksime de baldaŭa demografia katastrofo. Post la kolapso de Sovetunio ekzemple en Latvio la nombro de la loĝantaro ŝrumpis je 25 procentoj, kaj UN prognozas plian ŝrumpon je 22% ĝis la jaro 2050. Similaj tendencoj estas konstateblaj en Estonio, kie ĝis 2050 la loĝantaro probable ŝrumpos je 13% kaj ĝis 2100 je 32%. La respektivaj ciferoj por Litovio estas 17% kaj 34%. Pri la amasa elmigrado de homoj kulpas pluraj kialoj kiel malaltaj salajroj, nesufiĉa ekonomia kresko, pesimismo kaj malbonaj perspektivoj por la estonto, forta rezisto kontraŭ nova enmigrado, precipe en Latvio, kie naciismaj fortoj minacis la registaron per aktiva kontraŭstarado. Kun tio estas ligita la rapida elĉerpiĝo de kleraj kaj kvalifikataj homoj, kio kondukas al la demando, kiu iam okupiĝos pri la maljunuloj kaj entute pri la lando kaj ĝia socio mem. Do, vastajn regionojn en la Baltaj Landoj minacas populacia dezertiĝo.

De entute ĉirkaŭ 100´000 estonoj vivantaj ekster Estonio 40´000 troviĝas en Ruslando, 35´000 en Kanado kaj 15´000 en Svedio. Aliaj grupoj ekzistas en Finnlando, Sudafriko kaj Aŭstralio. En Germanio vivis en 2010 ĉirkaŭ 4000 estonoj.

‚Naciaj minoritatoj, nacia kaj lingva politiko kaj homaj rajtoj

Komence de 2016 en Estonio vivis, laŭ oficialaj indikoj, 1,32 milionoj da homoj. De tiuj 330´263 estis etnaj rusoj (148´430 viroj kaj 181´833 virinoj).

[100] Vd. https://www.valisluureamet.ee/pdf/raport-2018-ENG-web.pdf.

Post Latvio, Estonio havas la plej grandan rusan minoritaton, nome ĉirkaŭ 25 procentoj de la loĝantaro estas etnaj rusoj. Se oni aldonas la ukrainojn kaj belorusojn, la parto de slavaj, fakte ruslingvaj minoritatoj en Estonio estas 31%. La parto de etnaj estonoj en Estonio (905´805 personoj) estas 68,83 procentoj.

La sekva tabelo montras la disdividon de la ruslingva loĝantaro laŭ provincoj en Estonio (fino de 2016):

Provinco	ruslingvanoj
Harju maakond (mk)	180´477
-Tallinn (urbo)	155´263
Ida-Viru mk (Narva)	106´664
Tartu mk (provinco)	17´572
-Tartu (urbo)	13´651
Pärnu mk	6´373
Lääne-Viru mk	5´472
Valga mk	3´730
Jõgeva mk	2´216
Lääne mk	1´851
Viljandi mk	1´215
Võru mk	1´176
Rapla mk	1´108
Põlva mk	1´088
Järva mk	807
Saare mk	284
Nekonataj ceteraj	261

La ĉefa parto de la rusoj en Estonio vivas en urboj, precipe Tallinn, Narva, Sillamäe, Kohtla-Järve kaj Paldiski. En la ĉefurbo Tallinn la proporcio estas 55% estonoj kaj 37% rusoj. En Tartu la parto de rusoj estas nur 15%. En Tartu la rusoj ŝajnas esti pli bone integritaj ol en Tallinn kaj parte eĉ asimilitaj. En suda Estonio rusoj apenaŭ vivas aŭ estas plene integritaj aŭ asimilitaj, ankaŭ lingve.[101] Sed en tiuj regionoj la sinteno de la etnaj estonoj rilate al la rusoj ĝenerale ne estas esence pli pozitiva ol en aliaj regionoj de Estonio. Tio estas tutestonia problemo, sendepende de la regiono. Krom tio oni devas konsideri, ke nur tre malgranda parto de rusoj estas vere asimilitaj al la estona etno, komunumo aŭ nacio. Ĉefe koncernataj de la asimilado estas rusaj infanoj, kiuj vivas en pure estona ĉirkaŭajĵo kaj vizitas estonan lernejon. Ekzistas kazoj de infanoj, kiuj hontis pro sia rusa deveno kaj klopodis komplete estoniĝi.

Depost 2012 la nombro de rusoj vivantaj en Estonio malkreskis je ĉ. 5000 personoj. Samtempe, la nombro de etnaj estonoj reduktiĝis je ĉ. 9200 homoj. Pro aldoniĝo de iu kvanto da homoj kaj eta kresko ĉe aliaj etnoj la suma loĝantaro malkreskis je ĉ. 11´200 personoj. Tendence la nombro de etnaj estonoj malkreskas pli rapide ol la nombro de anoj de aliaj etnioj.

Depost 2010 inter ruslingvanoj ekzistas forta tromulto da maljunuloj (pli aĝaj ol 65-jaraj) kompare kun infanoj sub 15 jaroj. Laŭ estonaj indikoj kulpas la elmigrado, sed ĉefe la malalta kvoto de naskiĝoj ĉe etnaj rusoj, kiu estas observebla jam de 50 jaroj kompare kun la etnaj estonoj. Rusetna virino en Estonio naskas averaĝe 1,3 infanojn, dum etna estonino naskas 1,65 infanojn.

La hodiaŭa ruslingva minoritato konsistas preskaŭ nur el rusoj, kiuj estis loĝigitaj dum la sovetia tempo, kaj nature el ties posteuloj. Ĉi tiu cirkonstanco grave influas la rilatojn inter tiuj etnoj, kiujn necesas leĝe reguligi por eviti nekontroleblajn situaciojn kaj konfliktojn. La juran kaj socian statuson de la rusa minoritato en Estonio reguligas antaŭ ĉio estoniaj leĝoj pri ŝtataneco kaj lingvo.

Civitano de Estonio povas fariĝi persono, kiu posedis la estonan ŝtatanecon jam antaŭ la 16a de junio 1940. Ili aŭtomate konsistigis la grupon de estonaj ŝtatanoj post la ŝtata sendependeco, kiu estis proklamita la 20an de aŭgusto 1991. Ankaŭ infanoj, kies gepatroj jam posedis la estonan ŝtatanecon,

[101] Grafikon vd. sub http://www.bpb.de/apuz/242513/minderheitenintegration-in-den-baltischen-staaten?p=all.

aŭtomate fariĝis civitanoj de Estonio. Tio signifas, ke preskaŭ ĉiuj etnaj rusoj de Estonio ne fariĝis ŝtatanoj de Estonio.[102]

Novaj leĝoj pri ŝtataneco kaj la rilato inter ŝtataneco, lingva kono kaj minoritata statuso

La apartiĝo de Estonio kiel respubliko de Sovetunio kaj formiĝo kiel nova, sendependa ŝtato de okcidenta tipo en 1991 estis grava cezuro por tiu lando en politika, ekonomia kaj socia rilatoj. La transformo okazis rapide, amplekse kaj profunde, kio estis ligita ankaŭ kun la enkonduko de novaj leĝoj. Ĉar vide al la granda rusa minoritato en Estonio la demando de la ŝtataneco staris en la centro de la atento, en 1991 estis reenkondukita la leĝo pri la ŝtataneco de 1938 en iom reviziita formo. Laŭ tiu leĝo, kiu baziĝas sur la principo de origino, ĉiuj estonaj civitanoj, kiuj vivis antaŭ la 16a de junio 1940 en Estonio, rericevis sian ŝtatanecon, inkluzive de iliaj infanoj, kaj la al ĝi apartenantan pasporton, dum ĉiuj ceteraj loĝantoj restis ekskluditaj de tiu ŝtataneco. Antaŭ la 30a de marto 1993 novaj civitaniĝoj dume entute ne estis eblaj, ĉar la leĝo, enkondukita en 1991, antaŭvidis tiun tempolimon por doni al la aŭtoktona (indiĝena) estona popolo la eblecon kaj privilegion mem reguligi kaj sekurigi siajn fundamentajn kaj instituciajn aferojn en la juna ŝtato sen enmiksiĝo de ne-estonaj fremduloj, diru rusoj. Per tio la estona etno ricevis konsiderindan politikan avantaĝon antaŭ aliaj etnoj.[103] Lige kun la rekonstruado de la estona naciŝtato preskaŭ la tuta sovetia (ruslingva) elito estis elŝanĝita per estonlingva elito.[104] Ĉar la sovetia ŝtataneco estingiĝis, la plimulto de la rusoj en Estonio, tio estas 32 procentoj, fariĝis senŝtatanoj aŭ homoj kun nejkara aŭ nedifinita ŝtataneco. En 1989 en Estonio vivis 963´281 (61,5%) estonoj, 474´834 (30,3%) rusoj, 48´271 (3,1%) ukrainoj kaj 27´711 (1,8%) blankrusoj, do entute 1´565´655 homoj. Tio signifis, ke en Estonio vivis ankaŭ 602´374 ne-estonoj.[105]

La sola oficiala lingvo de Estonio fariĝis la estona lingvo,[106] kiu apartenas al la grupo de la finn-ugraj lingvoj. Ĝi estas proksima parenco de la finna lingvo, sed memstara literatura lingvo ene de la finnugra grupo, al kiu apartenas ankaŭ aro da parencaj malgrandaj indiĝenaj lingvoj parolataj en Ruslando kiel la iĵora, vepsa, komia, mansa, maria, mordva, udmurta, samea, kaj hungara (kiu tamen ege diferencas de la estona).[107] Proksimume 83 procentoj de la estonoj parolas la estonan kiel denaskan, unuan aŭ duan gepatran lingvon. Nu, la estona lingvo, kiun eblas kompari kun la finna lingvo, vere ne

[102] Laŭ: https://www.bundestag.de/blob/502250/4a724aa7d34d30c84baed59a7046500f/wd-2-010-17-pdf-data.pdf (Bundestag).

[103] Kiam en la tempo de la ŝtata sendependiĝo komence de la 90aj jaroj evidentiĝis, ke la rusoj estos ekskluditaj el la politika procezo, verŝajne ludis rolon la timo de la estonaj politikistoj, ke la rusoj povus voĉdoni favore al Moskvo kaj do malhelpi la sendependiĝon de ilia lando. Kialon por supozi tion donis la rusa movado „Interfront“, kiu kontraŭis la ideon de la ŝtata sendependiĝo de Estonio, kiun aliflanke defendis la estona „Popola Fronto“, kiu estis fondita en 1988. La plimulto de la tiama rusa komunumo en Estonio kredis, ke la respubliko pluekzistos kiel integra parto de reformita soveta Unio kaj trovis tiun ideon bona.

[104] En tio cetere ne tro gravis, ĉu estonoj estis membroj de la Komunisma Partio, ĉar serĉataj estis aliaj kvalifikoj, pri kiuj tiuj homoj disponis.

[105] Krom rusoj, ukrainoj kaj blankrusoj ankau 16´662 finnoj, 4613 judoj, 4058 tataroj, 3466 germanoj, 3135 latvoj, 3008 poloj, 2568 litovoj, 297 svedoj kaj 13´791 aliaj. Popova, p. 130).

[106] Pri la lingvopolitiko en Sovetunio: Kvankam dum la sovetia tempo la estona lingvo ne estis eksplicite subpremata kaj ekzistis kiel oficiala lingvo de la respubliko en dulingva situacio kune kun la rusa lingvo, evidentiĝis, ke la rusa lingvo fariĝis pli kaj pli domina, ĉie en la publikeco uzata lingvo en Estonio, dum la estona lingvo estis pli kaj pli forpuŝita al la dua, formala signifo kaj privata sfero, malgraŭ aperado de diversaj estonlingvaj presaĵoj (ofte en limigita kvanto). Per aliaj terminoj, en Estonio establiĝis situacio de „unuflanka bilingvismo“ (Chinn/Kaiser), en kiu la ´socio´, t.e precipe la rusaj enmigrintoj atendis de la estonoj, ke ili scipovu la rusan lingvon por interkomunikadi kun la rusoj (kaj ceteraj sovetianoj, kiu ekloĝis en Estonio). Pro tio la rusoj vivantaj en Estonio (kaj en ĉiuj ceteraj sovetiaj respublikoj) ne vidis la neceson lerni la indiĝenan lingvon de la koncerna respubliko, do la estonan lingvon en la kazo de Estonio, ĉar ili kredis, ke la rusa lingvo sufiĉas. Dum la etnaj estonoj ĝenerale lernis kaj scipovis kaj la estonan kaj rusan lingvojn, la rusoj ĝenerale ne lernis kaj do ne scipovis la estonan lingvon. Tia sinteno estis konsiderata de la estonoj kiel esprimo de indiferenteco kaj senrespekteco rilate al la kulturo de la indiĝena popolo kaj kaŭzis negativan reagon flanke de la estona socio, kio plilarĝigis la abismon inter estonaj indiĝenoj kaj rusaj/sovetiaj enmigrintoj. Cetere, la sovetia ŝtato ne konis tutsovetian oficialan lingvon, do la rusa lingvo ne funkciis kiel tia lingvo, sed estis propagandata, precipe en la tempo de Leonid Brejĥnev, kiel „inter-nacia” lingvo (ruse mežnacional´nyj jazyk), fakte kiel lingua franca de la unio, ekzemple de la esperantisto kaj „socilingvisto“ Magomet Isaev.

[107] Vd. https://eo.wikipedia.org/wiki/Finn-ugra_lingvaro.

estas aparte facile lernebla por homoj, kiuj ne adoptis ĝin denaske kiel gepatran lingvon kaj al kiuj estas malfacile lerni fremdajn lingvojn.[108]

Per nova leĝo de 1992 tiuj estoniaj senŝtatanoj ricevis la eblecon fariĝi civitanoj de Estonio, se ili konsentis akcepti kaj plenumi la regulojn de tiu leĝo, kiu inter alie postulis trapason de lingva ekzameno. En la kazo de la lingva ekzameno oni devas pruvi minimuman konversacian kapablon. Testataj estas la aŭda kaj lega komprenoj, parola kaj skriba kapabloj. Oni devas scipovi plenigi formularojn kaj verki aŭtobiografion. La testata lingvonivelo do fakte konformas al la nivelo post fino de la baza lernejo. Kiu malsukcesis en la lingva ekzamno, tiu povas ripeti ĝin ses monatojn poste.[109]

Apartaj kondiĉoj validas por kandidatoj, kiuj naskiĝis antaŭ la 1a de januaro 1930 kaj por invalidoj.

Nova leĝo pri ŝtataneco ekvalidis la 15an de aprilo 1995 kaj validas ĝis nun. Krom la pruvo pri lingvokono, la kandidato devas pruvi konojn de la estoniaj konstitucio kaj juro pri ŝtataneco. Persono, kiu volas akiri la estonian ŝtatanecon, devas esti minimume 15-jara kaj devis loĝi konstante kaj oficiale en Estonio minimume kvin jaron antaŭ la dato, en kiu la peto estis farita, PLUS unu jaron post la dato de la registriĝo de la peto. Ĉi tiuj kondiĉoj ne validas por personoj, kiuj loĝis en Estonio antaŭ la 1a de julio 1990 kaj kiuj petis restadpermeson antaŭ la 30a de aprilo 1996. La kandidatoj devas ankaŭ , ke ili pruvi, ke ili disponas konstantan monprovizon en sufiĉa alteco, por povi pagi sian vivadon kaj sekurigi la vivadon de siaj rajtigitaj familianoj. Mono por senlaboruloj, retoj kaj pensioj ankaŭ estas agnoskitaj kiel regulaj enspezoj.[110] Kandidatoj devas ĵuri fidelecon je la estona ŝtato kun deklaro, ke oni respektas la ordon de la konstitucio de Estonio. Viroj estas devigataj deĵori en la estona armeo. Homoj, kiuj akiris la estonan ŝtatanecon per sia naskiĝo, ne povas perdi ĝin, dum ĉiuj ceteraj specoj de civitanoj povas perdi ĝin en kazo de gravaj kaŭzoj.

Kune kun tiu evidenta severigo de la kondiĉoj por akiri la estonan ŝtatanecon, la reguloj por la lingva ekzameno fariĝis iusence pli arbitraj, kiel rimarkigis iuj kritikantoj. Kandidato devas esti kapabla verki eseon, kaj la temoj traktotaj dum la parola ekzameno ne plu estas anticipe fiksitaj, tiel ke la kandidato devas esti kapabla paroli pri ajna temo, kio nature malfaciligas la preparadon de la ekzameno.

Rusoj, kiuj trapasis tiun ekzamenon kaj malsukcesis en ĝi, plendis pri ĝia maljusta karaktero. Kvankam lia patrino estas estonino kaj li scipovas la estonan lingvon, iu kandidato fiaskis en la ekzameno, ĉar laŭ propra klarigo li ne povis ĝuste respondi la demandon pri la signifo de la nacia floro (!) de Estonio.

Ĉar multaj junaj rusoj jam scipovas la estonan lingvon, por ili la koncerna ekzameno estas pli facile trapasebla kaj la kriterioj por fariĝi civitano de Estonio pli akcepteblaj. Multaj rusaj gepatroj donas siajn idojn al estonlingvaj infanĝardenoj kaj lernejoj por ebligi al ili fruan kaj pli facilan integriĝon. La parto de homoj sen ajna kono de la estona lingvo draste reduktiĝis ekde la ŝtata sendependeco en 1991, dum la parto de la parolantoj de la estona lingvo forte kreskis. 37 procentoj de la enketitaj rusoj respondis, ke ili aktive scipovas la estonan lingvon, dum 48% disponis almenaŭ pri pasiva kompreno de la lingvo. Nur 15% indikis, ke ili ne scipovas la estonan lingvon.[111]

En la komenco, la laboro de la ŝtata estona instanco, kiu devis trakti petojn de kandidatoj por la civitanigio, estis forte kritikata, ĉar evidente ekzistis pluraj gravaj problemoj kaj mankoj rilate la informadon de la koncernitaj homoj. La oficejo de OSKE en Tallinn estis vizitata de multnombraj homoj, kiuj serĉis fidindajn informojn por ricevi pasporton aŭ restadpermeson. Eĉ se la burokrataj problemoj intertempe estis grandparte solvitaj, la fakto ke sennombraj homoj, kiuj antaŭe estis normalaj civitanoj de iu ŝtato (Sovetunio) aŭ naskiĝis en Estonio, nun subite fariĝis senŝtatanoj aŭ eksterlandanoj, estis por ili nenormala afero kaj antaŭe neimagebla problemo, despli ke tiuj homoj posedis nur unusolan ŝtatanecon. Ankaŭ kelkaj reguloj de la koncernaj novaj leĝoj pri ŝtataneco devis esti konsideritaj kiel

[108] Cetere, la samo validas por la latva kaj litova lingvoj, kvankam ili ne estas finnugraj ingvoj.
[109] La kondiĉojn por la partopreno vd. sub Vd. https://www.hm.ee/en/activities/estonian-and-foreign-languages/official-language-and-level-examinations.
[110] La estonan leghon pri shtataneco (en germana lingvo) vd. sub http://www.verfassungen.eu/ee kaj http://www.zaoerv.de/08_1938/8_1938_1_b_547_552_1.pdf. En la angla lingvo: https://www.riigiteataja.ee/en/eli/512022015001/consolide.
[111] Laŭ: Bundestag.

altgrade dubindaj: Oni povas demandi sin, ĉu ekzemple la ricevo de ŝtataneco povas dependi de sufiĉaj monrimedoj aŭ de konstanta enspezo (kiel regula salajro aŭ rento). Ankaŭ la postulo deklari lojalecon antaŭ la konstitucio estis konsiderata kiel stranga postulo same kiel la scipovo de fremda lingvo, kiun antaŭe tiuj homoj neniam bezonis kaj kiu por maljunuloj estas malfacile lernebla. Multaj rusoj apartenis al pli malaltaj sociaj tavoloj kun simplaj profesioj sen pli alta klereco. Esploroj montris, ke 70 procentoj de la kandidatoj ne kapablas plenumi la lingvajn postulojn. Krom tio oni kritikis la nesufiĉajn eblecojn por lerni la lingvon kaj la altajn kostojn por la lernado kaj la ekzameno. Multaj rusoj bezonis kelkcent horojn por atingi la postulatan nivelon. En 1998 la kostoj por tio estis ĉ. 3000 estonaj kronoj (t.e. ĉ. 300 svisaj frankoj), kvankam la averaĝa monata salajro estis 1800 kronoj, kaj la subtena mono por senlaboruloj 300 kronoj.

La troa premo de ekstere povas konduki al la abomeno kontraŭ la estona lingvo mem, eĉ al la rifuzo de la lingvo integrado pro protesto, kiel klarigis kritikantoj de tiuj kondiĉoj. Iuj rusoj eĉ opinias, prave aŭ ne, ke la estonoj volas venĝi sin post longa (sovetia) periodo, kiam ĉiu loĝanto de Estonio estis devigita lerni kaj scipovi la rusan lingvon. Per tiaj ekzamenoj, kiuj ĉiujare iĝas pli kaj pli komplikaj, oni nur malfaciligus la vivon de la rusoj en Estonio. Nature, la plimulto de la etnaj estonoj konsideras tiujn ekzamenojn ĝustaj kaj necesaj, dum multaj rusoj simple dubas pri ilia senco kaj pri la altrudo de la estona lingvo al la rusoj.[112]

La kritikaj reagoj de la internacia komunumo al tiuj pli severaj reguloj kaj la internacia premo kontraŭ Estonio kaŭzis, ke Tallinn estis devigata adopti rimedojn, kiuj faciligas kaj plirapidigas la civitaniĝon de senŝtatanoj loĝantaj en Estonio. Tiel, en februaro 1999 ekvalidis modifita leĝo pri ŝtataneco, laŭ kiu la infanoj de senŝtataj gepatroj povas peti la estonan civitanecon ĝis la 15-a jaraĝo. Ekde 2002 kandidatoj por la civitaneco, kiuj trapasis gimnaziojn kaj pli altajn porprofesian lernejojn kaj kiuj sukcese trapasis ekzamenojn en sociaj sciencoj en la estona lingvo, estas liberigitaj de la lingvotestado. Kaj ekde 2004 la kostoj por la lingva ekzameno estis repagotaj, se oni sukcese trapasis ĝin.

En la jaroj 1992-2010 homoj ricevis ŝtatanecon de Estonio laŭ jenaj kvantoj:

1992	5´421
1993	20´370
1994	22´474
1995	16´674
1996	22´773

Kiel montras la sekva tabelo, post la enkonduko de la novaj reguloj la nombro de civitaniĝoj draste reduktiĝis:

1997	8´124
1998	9´969
1999	4´534
2000	3´425
2001	3´090
2002	4´091
2003	3´706
2004	6´523
2005	7´072
2006	4´753
2007	4´228
2008	2´124
2009	1´670
2010	1´184

Inter 1992 kaj 2010 do 152´205 personoj ricevis la estonan civitanecon, de kiuj la plimulto pro diversaj

[112] Vd. Popova, Ekaterina: Sprachen und interethnische Beziehungen in Estland in der Umbruchszeit. Peter Lang 2016. p. 276-7, 284.

kialoj ne devis fari lingvan ekzamenon, dum 66´012 personoj estis civitanigitaj surbaze de sukcese trapasita lingva ekzameno. La parto de la senŝtatanoj reduktigis ĝis la jaro 2010 de 32 procentoj al 7,5% (t.e. 104´813 personoj).[113] Ĉe tiu cifero oni devas konsideri la fakton, ke ĉ. 9% de la loĝantaro (t.e. 98´101 personoj) elektis la civitanecon de alia ŝtato, precipe Ruslando. Duoblan ŝtatanecon la estona leĝo en principo ne antaŭvidas (precipe por eviti samtempajn amasajn civitanecojn de Ruslando). Laŭ alia statistiko, parto de la senŝtatanoj reduktiĝis al 5,9% (ĝis 2017). La ĉefaj kialoj por tiu evoluo estas elmigrado, malalta naskiĝkvoto kaj precipe la problemo de la encivitanigo. Pro tio ekde 2006 malkreskis la nombro de encivitanigoj en Estonio. Multaj rusoj indikis, ke ili perdis la fidon je la statuso de egalrajta civitano de Estonio, pro kio multaj rusoj ne plu klopodas akiri la estonan ŝtatanecon.[114] Malgraŭ grandkvanta civitanigo de rusoj, ankoraŭ nun pli ol la duono de ruslingvanoj loĝantaj en Estonio ne posedas la estonan pasporton.

La problemo de la rusoj en Estonio esence komplikiĝas, ĉar la estona registaro ne konsideras ilin etna minoritato en la klasika senco, sed kiel enmigrintojn de la unua kaj dua generacioj, kaj, se ili ne ricevis la estonan civitanecon, kiel „personojn kun neklara (aŭ nedifinita) ŝtataneco“. Ĉiu tiu interpreto do faras el tiuj homoj praktike senŝtatanojn. Ĉi tiu kategorio ekzistas pro du kialoj: Unue en tiu ĉi kazo la regulo de la internacia juro, laŭ kiu okupacia potenco ne havas la rajton loĝigi en la okupataj teritorioj proprajn civitanojn. Due, la estona leĝo pri ŝtataneco malpermesas duoblajn ŝtatanecojn pro tio, ke tiuj povus rezulti el la ŝtataneca juro de Ruslando, kiu garantias al ĉiuj iamaj ŝtatanoj de USSR la ŝtatanecon de Ruslando, se ili petas ĝin. Kompreneble, por Estonio tio ne estis akceptebla.

Provizora solvo estas „grizaj pasportoj“ por senŝtatanoj. Sed en la praktiko, la eldono de „grizaj pasportoj“ okazis malrapide kaj ege burokratece, kio kaŭzis longajn atendovicojn antaŭ la respondecaj oficejoj, kiuj devis trakti tiajn petojn. La informado estis maltaŭga kaj multaj homoj (rusoj) havis malfacilon plenigi la estonlingvajn formularojn. Krom tio, Estonio enkondukis enmigran kvoton, kiu estis fiksita je 0,1% de la konstanta loĝantaro. En 1997 tiu kvoto estis duonigita, kio kaŭzis, ke koncernitaj homoj devis atendi plurajn jarojn, ĝis ili ricevis la necesajn permesojn kadre de tiu kvoto. Tiel, en la kazo de la familia kunigo oni ofte rifuzis la restpermeson per la klarigo, ke la kvoto estas elĉerpita. Alia sekvo de tiuj reguligoj estis, ke estiĝis ne malgranda grupo, kiu restadis en Estonio kontraŭleĝe. Temis pri dekmiloj da homoj, kiuj en la komenco eble posedis restadpermeson, sed ial maltrafs longigi ĝin. Nur en 1999 la sorto de la kontraŭleĝaj homoj estis mildigita, char ili ricevis la okazon peti restadperomeson ekster la kvoto, sed nur kadre de la famlia kunigo.

Fakte ekzistas ankaŭ ruslingvanoj, kiuj intence preferas resti „senŝtatanoj“, ĉar tiu statuso permesas al ili facile viziti kaj Eŭropan Union kaj Ruslandon sen vizo.[115]

Ĉiuj tiuj ideoj, intencoj, proponoj kaj reguligoj flanke de Estonio postlasis la impreson, ke Estonio celas limigi la nombron de ruslingvanoj kaj igi ilin forlasi la landon. Nature, kritikantoj de tiuj reguligoj parolis pri diskriminacio de la ruslingva minoritato, kion la estona flanko rifuzis akcepti per atentigo al la estonaj leĝoj, kiuj malpermesas la diskriminacion kaj protektas la agnoskitajn etnajn minoritatojn kaj kiujn Estonio interpretas kaj aplikas laŭ propraj kompreno kaj bontrovo, baziĝante sur le laĝoj de la intermililta tempo kaj kongrue kun la principoj kaj normoj de la internacia juro.

Laŭ la estonia konstitucio de 1992, etnaj minoritatoj ne rajtas esti diskriminaciataj, rajtas posedi proprajn kulturajn instalaĵojn, utiligi sian lingvon kiel oficialan en regionoj, kie ili havas la plimulton de anoj. Ĉi tiujn aferojn reguligas la „leĝo pri la kultura aŭtonomeco de naciaj minoritatoj“ de 1992 apoge al la ĉi-koncerna leĝo de la jaro 1925, kiu modele reguligis tiujn rajtojn. Kiel esencaj grupoj, kiuj formas tiajn naciajn minoritatojn, estas konsiderataj finnoj, svedoj, judoj,[116] germanoj kaj rusoj (de antaŭ 1940), https://de.wikipedia.org/wiki/Estland#Nichtbürge se ili plenumas kelkajn kondiĉojn: ili devas havi minimume 3000 anojn, *posedi la ŝtatanecon de Estonio*, esti intime ligitaj kun Estonio sed distingiĝi per aparta (lingva kaj religia) kulturo. Ĉio tio signifas, ke la rusoj, kiuj enmigris dum la sovetia tempo, do post 1939/40, ne estas agnoskitaj kiel nacia minoritato kaj ne povas profiti la avantaĝojn de la estona leĝo pri naciaj minoritatoj. Sub tiaj kondiĉoj la situacio de la rusoj en Estonio nature esence komplikiĝis.

[113] Vd. Popova, p. 159-202.
[114] Vd. Bundestag.
[115] Vd. Bundestag;
[116] La juda komunumo de Estonio nombras ĉ. 2000 anojn (2013), ĉefe maljunulojn.

En la nova estona ŝtato ĝis nun nur du etnaj minoritatoj, nome la ingermanlandaj finnoj (10´693 personoj) kaj svedoj (300 personoj!) estis agnoskitaj kiel naciaj minoritatoj. La ĉi-koncernaj petoj de certaj rusaj organizaĵoj estis ĉiam rifuzitaj. Kiel Popova atentigis, la rusa komunumo, kiu estis loĝigita en Estonio dum la sovetia tempo, ne posedis la konscion pri minoritato (kiel la rusoj dum la intermilita tempo), ĉar Estonio ne signifis por ili pli ol ajna regiono de Sovetunio, malgraŭ ĝia respublika statuso.

Estonio subskribis aron da konvencioj kaj traktatoj pri protektado de minoritatoj por eviti diskriminacion, inter ili la Internacian Konvencion pri forigo de ĉiu formo de rasa diskriminacio, la Eŭropan Konvencion pri Homaj Rajtoj, la Kadran Konvencion pri protektado de naciaj minoritatoj de la Eŭropa Konsilio, la Internacian Akton pri ekonomiaj, sociaj kaj kulturaj rajtoj kaj kelkajn aliajn konvenciojn, kiuj protektas la rajtojn de etnaj minoritatoj. Krom tio, Estonio engaĝiĝas en diversaj organizaĵoj, kiuj okupiĝas pri minoritata protekto.

Malgraŭ tio, Amnestio Internacia atentigis en siaj jarraportoj (ekzemple de 2010) pri kazoj de diskriminacio de minoritatoj en Estonio. La Eŭropa Konsilio ripete admonis Estonion adopti rimedojn por eviti diskriminacion de minoritatoj. Kompreneble, ankaŭ Ruslando regule plendas pri laŭdira lezo de minoritataj kaj homaj rajtoj en Estonio preciüe koncerne la situacion de la rusa loĝantaro, kiu el la vidpunkto de la Kremlo estas malbona kaj suferas socian diskriminacion kiel etno kaj en la labormerkato.

La nova *lingva leĝo* de 1995 distingas nur inter la estona lingvo, kiu estas la sola oficiala lingvo de Estonio, kaj ceteraj fremdlingvoj. La rusa lingvo, kiu nun apartenas al la ĉi-lasta kategorio, ne plu estas eksplicite menciita, senkonsidere al la fakto, ke ĉirkaŭ unu triono de la estonia loĝantaro parolas la rusan lingvon. Samtempe ekzistas specialaj reguloj, laŭ kiuj la lingvo de nacia minoritato povas servi kiel oficiala lingvo en regionoj, kie tiu lingvo estas parolata de pli ol la duono de la loĝantoj. Tio estus la kazo en la komunumoj Narva kaj Sillamäe, kie pli ol 90% de la loĝantoj uzas la rusan lingvon. Tamen, Estonio rifuzis petojn el tiuj komunumoj oficialigi la rusan lingvon per la klarigo, ke la plimulto de la tieaj loĝantoj ne estas estonaj civitanoj, tute konforme kaj logike al la ĉi-koncerna „leĝo pri la kultura aŭtonomeco de naciaj minoritatoj“ kaj la „leĝo pri lingvoj de Estonio.

En juraj procesoj la rusa lingvo ja povas esti akceptita sub certaj kondiĉoj, en la komunumoj Vormsi kaj Noarootsi publikaj trafikŝildoj povas enhavi ankaŭ svedajn nomojn (kvankam en tiu regiono nur kelkaj homoj parolas la svedan), sed en Narva, kie vivas 95% (66´600) rusoj, oni vane serĉas ŝildojn en la rusa lingvo, ĉar la plimulto de la tieaj rusoj, kiuj alvenis en la sovetia tempo, ne estas konsideataj kiel aŭtoktona nacia minoritato, nek estas civitanoj de Estonio. En 1997 94% de la enketitaj personoj en nordorienta Estonio respondis, ke ili malofte aŭ neniam utiligas la estonan lingvon. Post kritiko de diversaj flankoj (ne nur de Moskvo, sed ankaŭ de eŭropaj instancoj) de tiu situacio, Estonio tamen modifis sian lingvan leĝon en 2001 per jena reguligo, ke „informoj de privata naturo povas esti aldonitaj en minoritataj lingvoj en la publikeco, se tio kongruas kun la publikaj interesoj de la sekureco, publika ordo, administratio kaj sansistemo kaj de la labora sekureco.“ Ĉu en la praktiko io ŝanĝiĝis… necesus veturi al Narva por kontroli tion.

Ankaŭ en la altlernejoj la rusa lingvo praktike tute malaperis, kvankam laŭ la leĝo la unstruado de aliaj lingvoj, ankaŭ rusa, povas okazi, sed ne rajtas superi la limon de 40%, dum 60% de la instruprogramo devas okazi en la estona lingvo. Esence la rusa lingvo estas instruata kadre de la fremdlingva instruado aŭ kadre de la studado de slavistiko kaj similaj akademiaj fakoj.[117]

Ke la estonoj ĝuas kvazaŭ naturajn privilegiojn, ŝajnas situi en la eco de la aferoj. Ili estas pli multe reprezentataj en gvidaj pozicioj de entreprenoj kaj organizaĵoj, dum ruslingvanoj laboras precipe en la sektoroj de servoj kaj produktado, ili do ŝajne plenumas la minoran laboron, precipe virinoj, kiuj ĝenerale estas malbone pagataj ol viroj. Multaj „klasikaj“ laborlokoj, kiuj ekzistis dum la soveta tempo precipe en la industrio, forfalis por tiu tavolo de laboristoj, kiuj devis ŝanĝi sian profesian kvalifikon. Estas okulfrape, ke en Estonio precipe ruslingvanoj estas aparte ofte koncernataj de senlaboreco, pli ofte kompare kun la estonoj kiuj ĝenerale disponas pri pli altaj salajroj kaj enspezoj kompare kun etnaj rusoj.[118] Laŭ iu studo de 1997, 15% de ne-estonoj perdis sian laborlokon, pliaj 17% vidis la danĝeron

[117] Vd. Popova
[118] Vd. la tabelon e Popova, p. 190.

perdi la laborlokon kaj 23% rezignis pri kandidatiĝo por laborloko pro mankanta lingva kvalifiko.[119] Ekzistas ruslingvanoj, kiuj speciale ŝanĝis sian nomon por havi pli da ŝancoj en la labormerkato. Aliflanke, anoj de junaj generacioj de estonoj ofte ne scipovas la rusan lingvon, kio faras la komunikadon inter estonoj kaj rusoj, ekzemple kun laborpartneroj el Ruslando, malfacila.

Homoj, kiuj ne havas la estonan ŝtatanecon, ne rajtas partopreni en naciaj balotoj, sed ili rajtas partopreni en balotoj sur la nivelo de estonaj komunumoj, en kiuj ili konstante kaj oficiale vivas kaj kie ili estis registritaj ĝis la 12a de julio 1995. Laŭ tiu regulo, preskaŭ ĉiuj rusoj de Estonio havas la eblecon partopreni en la politika vivo de sia komunumo, kvankam nur estonaj civitanoj povas okupi ŝtatajn postenojn. Ili ankaŭ rajtas ricevi socialajn servojn de la estona ŝtato. Se temas pri viroj, ili ne estas devigitaj deĵori en la estona armeo. Personoj kun „neklara (aŭ nedifinita) ŝtataneco“ posedas pasporton, kiu rajtigas ilin eniri la Schengen-spacon, kie ilio ankaŭ povas restadi dum limigita tempo. Do, el estona vidpunkto, homoj, kiuj apartenas al tiu kategorio, sume disponas pri konsiderinde pli multaj rajtoj ol „normalaj“ eksterlandanoj. Politikaj partioj, kiuj speciale reprezentas la rusojn de Estonio, ne (plu) ekzistas.

En la estona lingvo ne ekzistas klara semantika distingo inter „estono“ aŭ „estonino“ kaj „ŝtatano“ aŭ „civitano de Estonio“. Ĉi-lasta kompreno kongruas principe kun la kompreno pri la etno kaj estas forte ligita kun la scipovo de la estona lingvo. Laŭ tiu kompreno, estono estas tiu homo, kiu estas de estona origino kaj kiu parolas estone. La estona nacio principe do konsistas el homoj, kiuj estas de estona origino kaj parolas estone. Pro tio ne-estonaj enmigrintoj kaj anoj de ne-estonaj minoritatoj havas grandan problemon esti agnoskitaj de la estonoj kiel civitanoj de Estonio. Ĉi tiu problemo nature koncernas unuavice la ruslingvajn estonianojn, ĉar en Estonio apenaŭ ekzistas kvante konsiderindaj aliaj etnaj minoritatoj. Do, sub la kondiĉoj de tia kompreno pri etno kaj ŝtataneco iuj formoj de diskriminacio de ne-estonoj povas ekzisti imanente kaj esti aplikataj, konscie aŭ subkonscie, hazarde, arbitre aŭ intence, en tia sistemo.

Se konsideri tiun fonon necesas averti, ke ankaŭ la civitaniĝo ne protektas rusojn *per se* kontraŭ diskriminacio, malgraŭ la avantaĝoj, kiujn la ŝtataneco povas doni.

Laŭ propra indiko, Estonio realigas ĉiun duan jaron ampleksan enketon pri la situacio de la etnaj minoritatoj, enmigrintoj kaj personoj kun neklara aŭ nedifinita ŝtataneco. En tio oni esploras la aferojn kaj problemojn laŭ konkretaj kriterioj por, se necese, povi plibonigi la integradon aŭ integriĝon de tiuj homoj aŭ eviti ilian diskriminacion.

En la sfero de la politiko de la integrado de la rusa komunumo en la socion de Estonio estis lanĉitaj flanke de la estona ŝtato pluraj programoj, kiujn kritikistoj ne konsideris sufiĉe efikaj kaj karakterizis ilin kiel provon montri al la eŭropaj instancoj, ke oni ion faras. Ili avertas, ke en la praktiko temas pri disvastigo de la estona lingvo kaj pri provo asimiladi la rusojn en Estonio, kio ĝis nun malmulte sukcesis, laŭ la opinio de tiuj kritikantoj.

Fine de 2014 la estona registaro adoptis laŭ propraj indikoj novan strategion pri integrado, kiu validas ĝis nun kaj portas la titolo „Estonio integradi 2020“. Ĉi tiu strategio celas efektivigi trioblan celaron:

- Pli fortan malfermon de la socio kaj fortigon de la diversaj formoj de la integrado;
- Daŭrigon de la subteno de loĝantoj, kiuj progresis ĝis nun nur malmulte en sia integriĝo en la estonan socion;
- Antaŭenpuŝadon de la enmigrintoj en ties kapabloj adaptiĝi kaj integriĝi.

Ĉi tiu strategia plano donas prioritaton al sociekonomiaj, kulturaj kaj klerigaj faktoroj kaj celas evoluigi la interhomajn kontaktojn en Estonio sendepende de la etna deveno. Integrado kaj integriĝo estas konsiderataj kiel tutsocia defio, pro kio la estona respubliko ne volas resti pasiva en la klopodoj plibonigi la situacion de la ruslingvanoj kaj ne-civitanoj de Estonio.[120] Malgraŭ ĉiuj bonaj intencoj, oni

[119] Popova, p. 178.
[120] Vd. https://www.bundestag.de/blob/502250/4a724aa7d34d30c84baed59a7046500f/wd-2-010-17-pdf-data.pdf, p.

ne forgesu, ke Estonio ĉiam favoros la etnajn estonojn, kaj por tio ĝi havas siajn historiajn kialojn, devojn kaj rajtojn, tutegale kion Ruslando aŭ Eŭropa Unio opinias pri ĉi tiu demando.

Enketo pri personaj opinioj

Interesajn rezultojn havigis ampleksa empiria enketo, kiu estis farita inter 1180 personoj en Estonio en la jaro 2003. En la enketo partoprenis junuloj kaj junaj plenkreskuloj inter 16-32-jaraĝaj. 84% (993) de la partoprenantoj estis inter 17- kaj 23-jaraĝaj. En la enketo partopreno 400 personoj el Tallinn, 327 el Tartu, 286 en Narva kaj 167 en Sillamäe. Ĉiuj partoprenantoj loĝis oficiale en Estonio en la momento de la enketo. 42% (499) de la informantoj havis, laŭ propra indiko, la estonan naciecon kaj 52% (608) havis la rusan naciecon. 44 personoj havis alian naciecon. 71,5% (792) estis ŝtatanoj de Estonio, 19,3% (214) estis senŝtatanoj kaj 7,6% (84) estis civitanoj de Rusio. 91,4% (1012) personoj vivis en Estonio ekde sia naskiĝo. 38,7% (428) de la partoprenantoj estis anoj de porprofesiaj lernejoj kaj 59,6% (660) estis studentoj de privataj kaj ŝtataj altlernejoj. La demandoj praktike konsistis el asertoj, pri kiuj oni povis doni jesan aŭ nean respondon, kun nuancoj laŭ 6 nuancitaj kategorioj (sube sekvas sumigitaj kaj rondigitaj ciferoj, por indiki la tendencojn).

Tiel, unu el la pritaksendaj bazaj demandoj, kiuj koncernis la kunvivadon de estonoj kaj rusoj, 78 procentoj de estonoj kaj 72% de rusoj respondis pozitive, nome ke ĝi ne estas senproblema.

La demandon, ĉu la rusoj vivantaj en Ruslando signifas pliriĉigon de la estona socio, neis 46% kaj jesis 44% de la estonoj, neis 16% kaj jesis 63% de la rusoj.

La aserton, ke la rusoj vivantaj en Estonio signifas danĝeron por la estonaj lingvo kaj kulturo, neis 55% kaj jesis 39,% de la estonoj, neis 75% kaj jesis 18% de la rusoj.

Pri la opinio, ke estus pli bone, se la rusoj forlasus Estonion, konsentis 26% kaj malkonsentis 69% de estonoj, konsentis nur 2,6% kaj malkonsentis 96% de rusoj.

La opinion, ke la rusoj vivantaj en Estonio ne devus ricevi la samajn rajtojn kiel la estonoj, jesis 34% kaj neis 57% de la estonoj, jesis 6% kaj neis 92% de la rusoj.

La aserton, ke ruso/rusino vivanta en Estonio havas malpli da ŝancoj ol estono/estonino, jesis 55% kaj neis 37,% de la estonoj, jesis 86% kaj neis 11% de la rusoj.

La aserto, ke la plimultaj rusoj en Estonio vivas pli malbone ol la estonoj, jesis 27% kaj neis 66%, jesis 52% kaj neis 42,6% de la rusoj.

La opinion, ke la estona lingvo estis proklamita kiel sola ŝtata lingvo de Estonio, trovis 89% de la estonoj prava, dum 80% de la rusoj ne trovis ĝin prava.

La postulon, ke la rusa lingvo estu agnoskita en Estonio kiel dua ŝtata lingvo, trovis 89% de la estonoj malprava kaj 85% de la rusoj prava.

La opinion, ke nur rusoj scipovantaj la estonan lingvon, ricevu la estonan pasporton, jesis 89% de la estonoj kaj neis 60% de rusoj, dum 35% de la rusoj jesis ĝin.

La opinion, ke rusoj vivantaj en Estonio jam antaŭ 1991, havu la rajton ricevi la estonan pasporton ankaŭ sen lingva ekzameno, kontraŭis 73% de estonoj kaj jesis 85% de rusoj.

La plimulto, nome preskaŭ 90% de rusoj konfirmis, ke por ili gravas scipovi la estonan lingvon. Aliflanke, la opinion, ke estas grave scipovi la rusan lingvon, konfirmis 84% de la estonoj.

Rilate al Ruslando la opinioj de ruslingvanoj de Estonio klare diferencas de la opinio de la etnaj estonoj. Tiel, 78 procentoj de la etnaj estonoj konsideras la membrecon de Estonio en NATO plej bona garantio de la sekureco de Estonio, dum nur 41% de la rusoj kredas tion. Aliflanke, 53% de la ruslingvanoj kredas, ke la kunlaboro kun Ruslando estas pli bona opcio, dum nur 18% de la etnaj estonoj reprezentas tian opinion. Ankaŭ ĉe la fido al gazetaraj amaskomunikiloj ekzistas drasta diferenco: Dum 81% de la ruslingvanoj de Estonio indikis, ke ili pli fidas la rusajn amaskomunikilojn, nur 26% de etnaj estonoj faras tion. En principo la konsento pri la valoroj de la demokratio en si mem estas same altaj kaj

inter ruslingvanoj kaj etnaj estonoj, kvankam la fido je la demokratio *en Estonio* estas inter ruslingvanoj konsiderinde pli malalta ol inter la ceteraj civitanoj.

Konklude, ĉi tiu enketo klare montras, ke rilate la starigitajn demandojn ekzistas kruda kontraŭdira sinteno inter estonoj unuflanke kaj rusoj aliflanke.

Krom tiu enketo okazis en la jaroj 2003-10 anonimaj interparoloj (31) kun „ekspertoj“ el diversaj fakaj sferoj kaj intervjuoj (66) kun diversaj homoj kun la celo akiri pli profundajn fonajn sciojn pri la socia, ekonomia kaj kultura transformado en Estonio kaj por identigi la pensmanieron de la homoj. En la sekvo estu ĉerpitaj la plej interesaj kaj pensigaj opinioj kaj citaĵoj, esprimitaj plej ofte de rusoj.

„Kvankam ne ekzistas perfortaj publikaj tumultoj en Estonio, ambaŭflanke ekzistas sufiĉe da riproĉoj, kiuj ne estas prononcitaj. Estonoj kredas, ke rusoj havas imperiismajn ambiciojn kaj ke al ili mankas la kapablo respekti aliajn popolojn. La rusoj estas klasifikataj kiel ´kvina kolono´ de Ruslando. Pri rusoj oni ofte parolas negative aŭ moke, dum pri Ruslando oni raportas plej ofte negative, precipe pri rusaj krimuloj.“

„Rusoj estas konsiderataj kiel malplivaloraj fortoj en la labormerkato. Ankaŭ la novan historiografian interpretadon rusoj ne povas akcepti. Plej ofte tiaj temoj estas pridiskutataj hejme, kie oni povas libere doni spacon al sia frustracio. Kaj la junuloj interbatas sin surstrate kaj ofendas unu la aliajn.“

„La interetna situacio trankviliĝis. Intertempe, la estonoj komprenis, ke la rusoj ne forlasos la landon kaj ke la etnoj devas pace kunvivadi“, sed „en la politiko nenio ŝanĝiĝis“ [rilate al la rusoj].

Precipe en etne miksitaj regionoj (kiel Tallinn) povas okazi interetnaj konfliktoj, malpli tamen en etne homogenaj regionoj kiel en la regiono de Ida-Virumaa (Narva), kie loĝas pli ol 70% da rusoj.

„Kvankam nuntempe ne okazas konfliktoj, oni povas diri, ke la estonoj ne havas pozitivan opinion pri ni rusoj. Rusoj ĉagrenas estonojn. Ni [rusoj] havas la impreson, ke ili tute ne volas kompreni kelkajn aferojn.“

„Multaj rusoj komprenis, ke ili devas lerni la estonan lingvon. Multaj estonoj komprenis, ke la rusoj ne estas kulpaj, ke ili vivas en Estonio aŭ naskiĝis ĉi tie.“

Laŭ la eldiro de diversaj informantoj, en partoj de la estona kaj rusa komunumoj kreskas la kompreno pri la aparta demografia situacio post la restarigo de la sendependeco kaj pri la neceso de la paca kunekzistado de ambaŭ etnoj en la nova ŝtato kaj de la reciproka akcepto.

Malgraŭ tiu pozitiva pritakso ekzistas ankaŭ homoj, kiuj opinias, ke la estonoj ne volas akcepti la rusojn aŭ doni al ili la estonian ŝtatanecon, kaj ke ekzistas laŭetnaj „rezervejoj“ en Estonio kaj en Tallinn.

Sed la ĉefaj problemoj de la regiono de Narva ne estas unuavice la lingva problemo aŭ la ŝtataneco, kiel la informanto klarigis. La ĉefaj problemoj koncernas la ekonomian, infrastrukturan kaj socian situaciojn de la regiono Ida-Virumaa, kiu estas malpli evoluinta kaj prospera ol aliaj regionoj de Estonio, kie plimulte vivas la estona etno. „Se la vivnivelo kreskas en tiu regiono, tiukaze aperos ankaŭ malpli da etnaj problemoj.“ Eĉ bonaj konoj de la estona lingvo ne aŭtomate signifas sukcesan integriĝon aŭ ne ĉiam helpas ricevi laborlokon en tiu regiono, ĉar neniu bezonas ĝin, kiel atentigis alia ruso, kiu partoprenis la enketon de Popova. Ĝenas la ruseca prononco aŭ la rusa familia nomo. Eĉ rusoj, kiuj bone scipovas la estonan lingvon kaj konsideras sin profesie integritaj, ne ĉiam sentas sin nepre kiel parto de la estona komunumo.

„En Estonio okazas marĝenigo de regionoj kiel Ida-Virumaa, kiuj estas prezentataj en la gazetaro kiel problemaj regionoj. La registaro ne prenas rimedojn por efika evoluado de tiuj regionoj. Tiel aperas la impreso, kvazaŭ tiuj regionoj ne apartenus al Estonio.“

„(…)Kio ne plaĉas al mi, estas, ke certaj homoj nomas nin rusojn okupantoj. Ni rusoj estas jam delonge pretaj pace kunvivadi [kun la rusoj en Estonio] kaj jam delonge pruvis nian lojalecon. Malgraŭ tio flanke de la estonoj daŭre ekzistas sufiĉe granda malfido. La rusoj volas vivi tute normale ĉi tie, labori kaj eduki siajn infanojn. Same kiel la estonoj ni klopodas konstrui la ŝtaton kaj laboras por la bono de Estonio.“

„La plej granda eraro estas kredi, ke la rusoj okupis Estonion. Nur armeo povas okupi iun landon. Se mi estas konsiderata kiel okupanto, tio sonas por mi maljuste kaj ridinde. La vorto estas erariga kaj ĝia uzado devus esti malpermesata en Estonio rilate al la rusoj. La rusoj, kiuj naskiĝis ĉi tie, neniel estas okupantoj. Kial la germanoj vivantaj en Estonio ne ankaŭ estu konsiderataj kiel okupantoj?“

„Ĝis antaŭ kelkaj jaroj, Rusio kaj Estonio estas partoj de unu sama ŝtato“ [nome Sovetunio].

„La nacia politiko en Sovetunio estis malbone pripensata. Ĉiuj estis maljuste traktataj, kaj la rusoj kaj la estonoj en Estonio.“

„Oni tro malmulte distingas la sovetian potencon disde la rusoj.“

„La rusoj en Estonio vivas averaĝe pli malbone ol la estonoj. Ili havas pli da problemoj, pli da timoj pro la estonteco, pli da financaj malfacilaĵoj. Estas pli malfacile por ni trovi laboron. La demando de la propra identeco estas ĉio alia ol facila. Kiu ni estas ĉi tie? Kion ni rajtas fari? Aldona problemo estas, ke ne ĉiuj same bone scipovas la estonan lingvon. Tia situacio estiĝis parte pro historiaj, parte pro ekonomiaj kialoj. Kulpas parte la rusoj, parte la estonia ŝtato, kies politiko rilate la rusojn ne estas ideala. Ekzistas multaj senlaboraj kaj drogemaj rusoj. Multaj havas minimumajn enspezojn, kaj apenaŭ ekzistas rusoj en la strukturoj de la potenco.“

„La estonia ekonomia kreskas kaj prosperas kaj la rusoj fariĝas ĉiam malpli konkurenckapablaj, dum la sociaj problemoj kreskas, kiuj iam povos konduki al konfliktoj.“

„La junularo en Estonio kreskas en socia malegaleco en la konscio, ke la personaj ŝancoj dependas de la etna deveno. Tipa estono estas bone edukita, havas bonan laboron kaj atingis ion en sia vivo, dum al tipa ruso ĉio tio mankas. Tio produktas frustracion.“

„Multaj gvidaj pozicioj estas okupataj de homoj, kies ĉefa kvalifiko estas ´estono´.“

„Ni vivas en socio de malegaleco, de du klasoj, en kiu la rusoj estas ´homoj de la dua klaso´.“

Kvankam multaj junaj rusoj konsideras Estonion kiel patrujon kaj naskiĝlokon, ili ofte adoras la rusan kulturon kaj Rusion kiel gravan lokon de la rusa kulturo. Kvankam multaj rusoj de Estonio havas parencojn en Ruslando, tiu lando tamen estas fremda al ili. Nur la rusaj radikoj, la rusa ´animo´ estas komuna. Iuj opinias, ke la promesoj de politikistoj de Ruslando protekti rusojn en eksterlando ne plenumiĝis, pro kio tiuj politikistoj ne meritas respekton. La opinio de kelkaj estoniaj rusoj pri Ruslando estas vere negativa kaj la opinio pri la vivo en Estonio estas multe pli pozitiva.

„Ni [rusoj en Estonio] vivas en alia kultura ĉirkaŭaĵo, en alia ekonomia situacio, havas aliajn valorojn kaj alian orientiĝon. Eĉ la lingvaĵo diferencas pli kaj pli. La rusoj en Estonio orientiĝas pli kaj pli laŭ la eŭropaj valoroj, laŭ EU, laŭ la multkultureco. Ni estas pli toleremaj. Ni vojaĝas pli ofte al Eŭropo. Ni havas tute alian rilaton al la ŝtato.“

„La mentaleco [de la rusoj en Estonio] estas alia ol tiu de la rusoj en Ruslando. La rusoj de Estonio estas pli pragmatismaj, pli malvarmaj, pli ĝentilaj [ol la rusoj en Ruslando]. La rusoj de Estonio adaptiĝis al la merkatekonomio kaj al la eŭropa kulturo de la komunikado.“

„En Estonio mi ne havas timon“.

Multaj rusoj, kiuj naskiĝis en Estonio, konsideras tiun landon sia patrujo, ĝojas pri ĝiaj sukcesoj kaj fieras pri ĝiaj atingoj. Ruslandon ili konsideras kiel sian etnan, historian patrujon. Malgraŭ ilia amo al Estonio, multaj rusoj plendas, ke ili ne sentas sin akceptitaj de la estonoj, ĉar ili ne estas etnaj estonoj kaj do laŭ ilia opinio neniam povos aparteni al la estona komunumo. Por eviti tiun dilemon, kelkaj rusoj de Estonio konsideras sin eŭropanoj.

Tre interesa estas la opiniesprimo de 25-jara ruso en Estonio, kiu studis en la universitato de Tartu kaj kiu diris jenon:

„La plimulto de miaj amikoj volas forlasi Estonion. Sed ili ne volas iri al Ruslando, sed al Germanio, Francio, Anglio, Usono ktp. En eksterlando ruso povas aserti, ke lia patrujo estas Estonio kaj neniu negative reagas. Ruso en Estonio ne povas diri tion, ne estante estono. Kiel ruso oni sentas sin kiel eksterlandano en la propra lando.“

Kaj alia, 32-jara, ruso, kiu vivas en Estono, aldonis:

„Oni diras, ke estas pli bone vivi kiel fremdulo en fremda lando ol kiel fremdulo en la propra patrujo. Mi preferas esti fremdulo en Francio ol fremdulo en Estonio. Ne esti akceptita kiel franco en Francio ne estas tiel tragike. Malgraŭ esti naskita en Estonio kiel ruso, oni tamen estas konsiderata kiel fremdulo.“

Spite al ĉiuj problemoj de la integriĝo, 18-jara ruso konkludis jene:

„Laŭ mia opinio, la plua vojo de la rusoj en Estonio povas esti nur jena: Konservi la proprajn kulturon kaj lingvon, respekti la estonajn kulturon kaj tradiciojn, lerni la estonan lingvon kaj kune kun la estonoj labori por la bono de nia ŝtato, nia komuna domo.“

Sed ekzistas ankaŭ iom pli nuancita opinio, kiel tia:

„Dum oficialaj eventoj oni rajtas paroli nur estone kaj la rusa lingvo ne rajtas esti parolata. Sed kial? Ekzistas tiel multaj rusoj en la lando, ke ili apenaŭ povas esti konsiderataj kiel minoritato. Malgraŭ tio oni tiel kondutas, kvazaŭ ni ne ekzistus. Niaj rajtoj do estas limigataj.“ Estas do logike, ke multaj rusoj pledas por tio, ke la rusa lingvo ricevu oficialan statuson almenaŭ parte, aŭ kiel duan ŝtatan lingvon. Diversaj rusoj opinias, ke la enkonduko de la rusa lingvo kiel dua ŝtata lingvo helpus la integradon de la rusoj en Estonio. Ekzemple ili havus malpli da problemoj por ricevi la estonan ŝtatanecon. Sed ekzistas rusoj, kiuj trovas tiun ideon malbona. Nome, se oni enkondukus la rusan lingvon kiel duan ŝtatan lingvon, tuj komenciĝus novaj kvereloj, ĉar de la homoj, ekzemple vendistoj, oni postulus, ke ili parolu la rusan lingvon, kvankam ili ne scipovas ĝin.”

Alia afero estus enkonduki la rusan kiel oficialan lingvon en regionojn, kie loĝas plimulte rusoj, ekzempe en Narva. Sed estus malrealisme kredi, ke Estonio ie ajn sur sia teritorio enkondukus la rusan kiel duan oficialan lingvon, eĉ sub la premo de EU aŭ Moskvo Estonio rifuzus fari tion.

Nature, la motivacio lerni la estonan lingvon reduktiĝus, se la rusa lingvo fariĝus dua oficiala lingvo, kiel atentigis alia ruso, kiu partoprenis en la enketo de Popova. Samtempe li kredas, ke la socia maljusteco estus malpli granda, ekzemple sur la labormerkato, se la rusa lingvo estus dua ŝtata lingvo.

Do, estas videble, ke la enkonduko de la rusa lingvo havus avantaĝojn kaj malavantaĝojn, sed la riskoj, kiuj estus ligitaj kun ĝi evidente estus tro grandaj por Estonio.

Ke multaj rusoj trovas la mankon de oficiala statuso por la rusa lingvo maljusta kaj diskriminacia, estas alia afero.

Multaj rusoj opinias, ke la estona lingvo estas tro krude altrudata kaj la rusa lingvo tro forte subpremata. Iu ruso opiniis, ke la lingvopolitiko baze estis ĝusta sed malĝusta laŭ ĝia efektivigo. Estas kompreneble, ke la estona lingvo devis stari en la centro, protektata kaj subtenata. Malgraŭ tio estis malĝuste ignori la rusan lingvon, kvankam tio estis komprenebla, sed ne tro klarvida decido.

Kiel menciite supre, la klopodoj de la estona registaro integri la rusojn estas ĝenerale agnoskataj de la rusoj en Estonio, sed ne ĉiuj konsideras ilin sencohavaj kaj sukcesaj. Multaj konsideras ilin klopodoj por asimili la rusojn, do oni parolas pri politiko de kaŝita asimilado, kies sekvoj praktike signifus la kunfandon de la rusa popolo kun la estona popolo, neglektadon de la rusa lingvo, marĝenigon de la rusa popolo, perdon de la origina identeco, degeneron de la rusa lingvo kaj malaperon de la rusa etno. Iu 25-jara ruso timas, ke la rezulto estos, ke la rusoj de Estonio fariĝos nek rusoj nek estonoj, sed marĝenigitaj homoj. Tiel, multaj rusoj sentas sin duoble ekskludataj. Alia, 17-jara, ruso aldonis, ke rusoj ne volas esti nur ruslingvaj migrantoj. Iu 52-jara ruso plendis pri la mankanta dialogo inter rusoj kaj estonoj. Rigardante sur la paĝojn de oficialaj lernolibroj, oni povas ricevi la impreson, ke rusoj kaj estonoj ĉiam nur militis unu kontraŭ la aliaj.

Popova opinias, ke la estona politiko de la ekskludado kaj diskriminacio de la rusa komunumo kaŭzis negativajn sekvojn por la procezo de la integrado. Oni konstatis, ke malpli da rusoj partoprenas balotojn aŭ aktivecojn en sociaj organizaĵoj ol estonoj, do rusoj estas socie pli pasivaj, verŝajne pro tio, ke ili sentas, ke ilia kontribuo aŭ opinio povas esti ignorata aŭ ne sufiĉe serioze konsiderata de la estonoj. Ĉi tiu cirkonstanco povas konduki al reduktitaj lojaleco, apogo kaj fido rilate la ŝtaton, al la perdo de la intereso pri sociaj kaj politikaj temoj.

La problemo estas, ambaŭ kulturoj estas ege diversaj kaj havas malmulton komunan. Sed ekzistas ankaŭ rusoj en Estonio, kiuj fieras, ke ili apartenas al du kulturoj, rusa kaj estona. Kelkaj rusoj de Estonio eĉ konsideras, ke ili ne estas veraj rusoj, sed reprezentantoj de nova nacieco kun nova identeco. Nature, ekzistas homoj en Estonio, kies gepatroj estas ruso kaj estono.

Por plibonigi la integradon, pluraj rusoj postulas la modifon de la politiko pri integrado kaj ŝtataneco en Estonio.

Laŭ Ekaterina Popova, kiu gvidis la enketon, ene de la rusa minoritato ia videbla „mempercepto" ne elformiĝis kaj oni devas supozi, ke daŭros ankorau multe da tempo ĝis kiam aperos memstara etnokultura grupo flanke de la rusa komunumo en Estonio.

Je la fino de sia enketo Popova atentigis pri la fakto, ke la rusa lingvo reakiris prestiĝon, kiun ĝi komplete perdis post 1991. Ĝi eĉ forpuŝis la germanan kaj francan de la dua kaj tria rangoj de la lernataj lingvoj. Sed la junaj generacioj de Estonio ne lernas la rusan lingvon por subteni la integradon de la rusa minoritato de Estonio, sed por faciligi la komunikadon kaj komercon *kun Ruslando*. Ĉar post 1991 multaj junaj estonoj rifuzis lerni la rusan lingvon, ili hodiaŭ ne plu konas aŭ komprenas ĝin.

Alternativo al la estona ŝtataneco kaj integriĝo povus esti la elmigrado. Fakte, post 1991 la landon forlasis ĉirkaŭ 79´000 rusoj, precipe anoj de la sovetia armeo, de KGB kaj de similaj organizaĵoj. Laŭ iu enketo, nur 5% de la demanditoj kun estona nacieco, 7% kun rusa nacieco kaj 3% de la senŝtatanoj serioze konsideras elmigradon. Laŭ la sama enketo, 23% de estonoj, 5% de rusoj kaj 18% de senŝtatanoj preferus formigri *al alia EU-lando*. Nur malgranda parto esprimis la deziron migri al Ruslando. Ŝajnas, ke la plimulto de la rusoj de Estonio malgraŭ ĉio tamen trovis aranĝon kun la estona ŝtato. Pli altaj estas la ciferoj ĉe jena enketo: 48% de estonoj, 38% de rusoj kaj 51% de senŝtatanoj esprimis la deziron, ke *iliaj infanoj* formigru al alia EU-lando.

Por Ekaterina Popova estas grave emfazi, ke ŝi povis pruvi, ke la rusa komunumo de Estonio ne povas esti simple konsiderata kiel „kvina kolono" de Moskvo, ĉar la situacio de tiu komunumo estas multe pli komplika ol ĝenerale supozate, kiel celis montri la supraj klarigoj. Nature, flanke de la estonoj restas skeptiko kaj malfido rilate al la rusa komunumo, kio estas komprenebla, se oni konsideras la longan historion de rusa enmiksiĝo en Estonio, kiu havis danĝerajn momentojn, kiuj riskis forpuŝi la estonajn etnon kaj lingvon.[121]

[121] *Persona komento pri la libro de Popova:* Malgraŭ brile verkita analizo kaj farita enketo, la kritiko de Ekaterina Popova (pri kiu mi ne scias, ĉu ŝi estas rusino el Ruslando aŭ Estonio aŭ el alia lando) stereotipe trafas la estonian flankon koncerne la traktadon de la ruslingva minoritato en Estonio post la ŝtata sendependiĝo en 1991. Entute ŝi vidas la situacion de la ruslingva komunumo de Estonio tro negative kaj tro pesimisme, kvankam ekzistas ankaŭ pozitivaj kaj optimismaj aspektoj kaj rigardoj, kiujn ekzemple la raporto de Bundestag kaj aliaj verkaĵoj emfazas kaj de kiuj la ruslingvanoj de Estonio povas profiti, *se ili nur volus*. Mankas klara agnosko de la rajto de Estonio mem reguligi sian politikon pri etnaj minoritatoj, fiksi sian leĝon pri ŝtataneco, difini kiu apartenu al la estona nacio. Eble ŝi tro malmulte konscias pri tio kaj ne sufiĉe agnoskas tion, ke por savi la estonajn lingvon kaj kulturon Estonio klare vidis la neceson apliki aron da rigoraj rimedoj por sekurigi la pluvivadon de la estonaj etno kaj lingvo. Se do la aŭtorino miras pri tio, ke en la nova estona naciŝtato la estonoj strebas estonigi ĉiujn kampojn de la publika vivo kaj kulturo, tio tamen estas iom stranga kaj embarasa. En multaj kazoj ŝiaj klarigoj sonas kiel riproĉoj kaj akuzoj al la adreso de Estonio. Ankaŭ komplete mankas aprezo de la kondiĉoj de la politika libereco kaj de la pli kaj pli taŭga kaj efika ekonomia sistemo, kiu provizas la homojn per diversaj bonaj varoj, en kiuj ankaŭ la rusoj de Estonio vivas. Neniu komparo kun la sovetia tempo, kiu estis karakterizata de mallibereco kaj drasta manko de varoj! Kaj ankaŭ mankas kritiko de la provokoj flanke de la rusa registaro (precipe de Putin) kontraŭ Estonio. Ŝajnas, ke Popova ignoras la danĝerojn, kiuj povas minaci Estonion flanke de Ruslando lige kun la ruslingva minoritato en tiu lando. Male, oni simple turnas la lancon kaj ŝovas la kulpon al Estonio pro novaj konfliktoj inter rusoj kaj estonoj, kiuj eventuale povus eksplodi pro la nacia politiko de Estonio. Precipe en la regadotempo de Putin tiaj tendencoj kaj streboj estas klare konstateblaj. Certe, estas grave atentigi pri la eventualaj ´nigraj makuloj´ de la estona nacia politiko kadre de la naciŝtata politiko, ĉar politikaj kaj administraj ekscesoj kaj (kaŝita) diskriminacio de iu ajn homgrupo estas evitendaj. Sed la utiligo de kritiko de eŭropaj instancoj kontraŭ praktikoj de Estonio rilate la traktadon de la ruslingva minoritato, kiel Popova praktikas, aŭtomate apogas konscie aŭ senkonscie la argumentojn de Ruslando, kiuj certe ne estas honestaj, sed povas esti utiligataj por naciisma, ŝovinisma kaj imperiisma politiko de la premo kaj ĉantaĝo kontraŭ aliaj landoj, konkrete Estonio, se temas pri la „defendo de la interesoj" de la rusa minoritato ekster Ruslando. Tiaj libroj do vole-nevole servas al la rusa propagando kontraŭ Estonio. Cetere, ne malmultaj rusoj el Estonio, kiuj veturis al Ruslando post la sendependiĝo de Estonio, baldaŭ preferis reveni al ĝi, ĉar en Ruslando ili ne trovis taŭgajn kondiĉojn por konstanta pli bona vivado. Nu, Popova ja konfesas, ke la vivkondiĉoj en Ruslando ne estas favoraj. Do, entute pli da objektiveco aŭ honesteco estus necesesaj, se oni volas trakti tiajn temojn, faktojn, problemojn kaj cirkonstancojn. (Ĉi tiu kritiko rilatas precipe la parton de p. 159-202 kaj p. 290-324). En kelkaj kazoj oni trovas

Aliaj utiligitaj fontoj:

https://www.auwi-bayern.de/awp/inhalte/Laender/Anhaenge/Exportbericht-Estland.pdf

https://www.swissbalticchamber.com/newsletter.html

https://www.srf.ch/news/international/instrument-des-kremls-das-fernsehen-transportiert-nur-die-haelfte-der-wahrheit

https://uebermedien.de/25136/gutes-estland-wuestes-bulgarien-das-verzerrte-bild-zweier-eu-laender/

https://www.fpri.org/article/2015/10/russian-propaganda-disinformation-and-estonias-experience

https://warsawinstitute.org/russian-information-warfare-baltic-states-resources-aims

https://www.researchgate.net/publication/301565208_Estonia_Confronts_Propaganda_Russia_Manipulates_Media_in_Pursuit_of_Psychological_Warfare

* * * *

© Andreas Künzli, www.planlingvoj.ch, publikigita en septembro 2018.

La aŭtoro (lic.phil. / M.A.) studis slavistikon, orienteŭropan historion kaj internacian juron en la universitato de Zuriko en 1983-91, kun profundaj studoj pri tiuj fakoj ankaŭ poste. En la fako internacia juro li verkis studon pri la jura situacio de la Baltaj Ŝtatoj kun aparta konsidero de la tempo de ilia politika emancipiĝo en la 1980aj jaroj, kiu kondukis al ilia sendependiĝo en 1991. La Baltajn Ŝtatojn kaj precipe Estonion li ofte vizitis post la ilia sendependiĝo. Retestro de www.osteuropa.ch (ankaŭ: www.balkan.ch kaj www.slavistik.ch).

toponimojn skribitajn kiel „Tallin“, „Saarema“, kio estas heredaĵo el la sovetia tempo kaj nature ne estas akceptebla en tia disertacio, ĉar tiaj ortografioj oficiale ne plu ekzistas eĉ en la rusa lingvo.